

# le monde de l'ESPERANTO

numéro  
**603**  
2019-2



**DOSSIER**

## Espéranto et culture : Baldur Ragnarsson

**PAGE 6**

**ACTUALITÉS**

Cours d'interlinguistique à l'université  
Adam Mickiewicz de Poznań

**PAGE 22**

- L'actualité de l'espéranto
- La vie de l'association
- Culture et voyages

4,50 €

**espéranto**  
France

# La boutique d'Espéranto-France vous propose :

- des centaines d'ouvrages en espéranto, en français ou bilingues : manuels d'apprentissage, dictionnaires, romans, BD, livres pour enfants, essais, etc.
- des CD et des DVD
- des supports de communication: brochures, dépliants, affiches, panneaux d'exposition, dossier de presse, etc.
- des objets promotionnels : stylos, petits calendriers, T-shirts, autocollants, etc.



## Catalogue imprimé disponible au siège

- Téléchargez-le au format PDF sur [esperanto-france.org/boutique](http://esperanto-france.org/boutique)
- Recherchez des articles dans la [boutique en ligne](#)
- [Commandez en ligne](#) et payez directement en vous connectant à votre [espace personnel](#)

**Metodo 11 (pour commencer) v.2018**

- Metodo 11 (pour commencer) v.2018 -  
de Espéranto-France  
Catégorie : Les méthodes d'Espéranto-France  
Édité en 2018 par Espéranto-France  
100 pages  
Format : 210 x 149  
ISBN : 978 2 9507376 6 3  
140 grammes  
Prix catalogue : 9,00 €

commandez en direct !  
Vérifiez votre adresse de livraison et choisissez votre quantité !

Livraison :

Quantité :  [ajouter au caddie](#)

le catalogue de la boutique

recherchez à partir d'un mot...

Indiquez un mot (ou quelques lettres) du titre ou de l'auteur :  
 rechercher

... ou feuilletez le catalogue !

1. choisissez une page du catalogue :
2. choisissez un article pour afficher les détails :
  - 33 rakontaĵ
  - 7000 tagoj en Siberio
  - Abtunoj
  - Amara
  - Amol Inter ruĝol

Pas encore d'espace perso ?

Cliquez ici :

ACCUEIL | PLAN DU SITE | CONTACT | APPRENDRE | ADHÉRER | BOUTIQUE | PRESSE / MÉDIAS | SOUTIENS | **ESPACE PERSO** | français | Esperanto

Rechercher dans le site :

...et laissez-vous guider !

### éditorial • frontartikolo

**P**as de problème pour avoir suffisamment de matière pour *Le Monde de l'espéranto*. Le problème, c'est plutôt l'abondance des événements dont on voudrait parler, tant en ce qui concerne les rencontres que les nouvelles publications musicales ou littéraires.

Nous aurions pu avoir un numéro plus que double, si nous avions relaté les nombreuses rencontres en Slovaquie, dans les pays baltes, en Asie, en Amérique et ailleurs dans le monde.

Pendant le Mondial à Lahti (Finlande) il y a eu des changements importants à l'UEA. Nouveau bureau, discussions pour décider des activités futures, problèmes financiers...

Mais restons sur la note culturelle. Baldur Ragnarsson : un monument de notre littérature, proposé pour le prix Nobel. Une force tranquille ? Non, un esprit tourmenté, dans un pays politiquement stable, mais dans une nature tourmentée. Volcans, geysers, champs de lave, routes accidentées... mais aussi merveilleux lupins multicolores, oiseaux marins, beauté des paysages... Islande fascinante, et personnalité fascinante !

Merci à Emmanuelle, sans laquelle ce numéro n'aurait pu paraître. Elle a assuré les préparatifs pour la mise en page avec brio, et aussi la mise en page. Je ne me rendais pas compte jusque là de l'énorme travail à mettre en œuvre (et je pense que nos lecteurs en général n'en ont pas conscience). Bonne lecture !

Claude Nourmont, rédacteur en chef

**N**eniu problemo por havi sufiĉe da materialo por *Le Monde de l'espéranto*. La problemo estas ĝuste, ke abundas eventoj pri kiuj oni ŝatus paroli, ĉu temas pri renkontiĝoj, ĉu pri novaj muzikaj aŭ literaturaj eldonaĵoj.

Ni povintus havi pli ol duoblan numeron, se ni raportus pri la multaj renkontiĝoj en Slovakio, en baltaj landoj, en Azio, en Ameriko kaj alie en la mondo.

Dum la tutmonda kongreso en Lahti (Finnlando) okazis gravaj ŝanĝoj. Nova estraro, diskutoj por decidi pri la estontaj agadoj, financaj problemoj...

Sed ni restu ĉe la kultura flanko de la afero. Baldur Ragnarsson: monumento de nia literaturo, proponita por la Nobel-premio. Serena homo? Ne, malserena spirito en politike stabila lando, kun turmentata naturo. Vulkanoj, gejseroj, lafokampoj, danĝeraj vojoj, sed ankaŭ mirindaj multkoloraj lupenoj, marbirdoj, ravaj pejzaĝoj... Fascina Islando, fascina personeco!

Dankegon al Emmanuelle, sen kiu tiu numero ne povus aperi. Ŝi brile prizorgis ĉiujn preparojn por la enpaĝigo kaj ankaŭ la finan enpaĝigon. Ĝis nun mi tute ne konsciis, kiom enorman laboron tio postulas (kaj mi supozas, ke niaj legantoj ĝenerale ne konscias pri tio). Bonan legadon!

Claude Nourmont, ĉefredaktoro

### ACTUALITÉS

- L'espéranto au lycée p.4
- L'espéranto à l'ONU p.5

### DOSSIER

- Espéranto et culture :  
Baldur Ragnarsson p.6

### ASOCIA VIVO

- Turneoj p.14
- Ĝhoj pri UK p.16

### KULTURO

- Interlingvistikaj Studoj  
en Poznano p.22

### VOYAGE

- Vojaĝo al Finnlando p.26

Revue d'espéranto fondée en 1908,  
éditée par Espéranto-France,  
4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris  
Tél. 01 42 786 886 - [www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org)  
Tout (sauf réd.) : [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)  
Trimestriel : 4 n° par an - Dépôt légal à parution  
**Tous droits de reproduction réservés**

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.  
Directeur de publication : D. Loison  
Rédacteur en chef : Claude Nourmont  
[mondo@esperanto-france.org](mailto:mondo@esperanto-france.org)  
Envoi des articles 1 mois avant parution

#### Liste des contributeurs :

S. Barrier, *Bulteno de KAOEM*, G. Camy,  
P. Dasgupta, M. Dechy, J. Ducloyer, J. Dumoulin  
Y. Dumoulin, *Espéranto pour l'ONU*, A. Jausions  
M. Komarnicka, A. Lind, S. Marček, F. Martorell,  
B. Moon, Y. Nicolas, O. Prytz, E. Richard,  
N. Ruggiero, *La Saltejo*, T. Stepanova, R. Triolle,  
UEA, F. Wandervogel

#### Crédits photographiques :

B. Moon et suivant indications

Publicité/annonces : à la rédaction

Impression : Onlineprinters.fr  
Imprimé en septembre 2019  
Mise en page : Emmanuelle Richard

ISSN 1628-1942

## Livres

# La domination de l'anglais : un défi pour l'Europe,

par Robert Phillipson

**C**e livre explore le rôle des langues dans le processus d'intégration européenne ; il met en avant les mesures à prendre pour éviter de nous diriger vers une Europe uniquement anglaise et américaine. La manière dont l'Union européenne traitera le multilinguisme aura d'importantes conséquences pour les pays membres et les relations internationales : le respect des langues de chaque pays doit être au cœur du développement d'une Europe unie. Il est donc primordial de se demander

si l'expansion actuelle de l'anglais ne représente pas une menace sérieuse pour les autres langues européennes. Après avoir exploré les implications des politiques actuelles, l'auteur plaide en faveur de politiques linguistiques plus actives pour la sauvegarde d'une Europe multilingue.

En s'appuyant sur des exemples de pays ayant des politiques linguistiques explicites, le livre propose une politique linguistique inclusive pour l'Europe, donnant des pistes pour y parvenir avec des recommandations concrètes sur la

manière dont la politique linguistique européenne pourrait être mieux gérée.

Paru en 2003 sous le titre *English-Only Europe?*, cet ouvrage a été réactualisé par l'auteur, qui y a inclus les dernières actualités des politiques linguistiques des différents pays d'Europe. La préface de l'édition française est de François Grin, universitaire suisse, codirecteur du Centre européen pour les questions de minorités.



Robert Phillipson  
photo : PicMirandole – Travail personnel, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=76993324>

Dr. Robert Phillipson,

Professor Emeritus Copenhagen Business School [www.cbs.dk/en/staff/rpmsc](http://www.cbs.dk/en/staff/rpmsc)

e-mail : [rp.msc@cbs.dk](mailto:rp.msc@cbs.dk) <http://www.linguistic-rights.org/robert-phillipson>

*La domination de l'anglais : un défi pour l'Europe*, Robert Phillipson.

Préface de François Grin,

Traducteurs : Elisabeth Barbay, Bernard Comevin et Marcelle Provost.

Paris : Libre & Solidaire, 2019

## L'espéranto au lycée

# L'espéranto a pu rentrer dans un autre lycée !

**E**n novembre 2018, inspirés par un tract dénonçant l'inéquitable et coûteux enseignement des langues étrangères en Europe, trois élèves de 1<sup>re</sup> d'un lycée d'Oloron-Sainte-Marie ont choisi d'élaborer leur dossier TPE (Travaux Personnels Encadrés) sur le thème suivant : *Le principe d'une langue universelle est-il souhaité/souhaitable ? Cas de l'espéranto*. Leur professeur d'espagnol les a encadrés.

Pour ce faire, ils ont obtenu l'aide d'un espérantophone local qui leur a tout d'abord enseigné les notions rudimentaires de la langue. Ensuite il n'a fait que répondre à leurs nombreuses et souvent très pertinentes questions, questions traduisant une grande curio-

sité et un grand intérêt de leur part. Allant de surprise en surprise, les élèves n'ont pas pu tout retranscrire dans leur dossier de 20 pages, à la conclusion des plus favorables pour cette langue étonnante et méconnue qu'est l'espéranto.

Au-delà de la note obtenue (18/20), cet exercice s'est avéré être un excellent moyen de promotion de l'espéranto parmi les élèves, car un grand nombre d'entre eux ont été consultés sur leur vision de la communication internationale... et donc de l'espéranto !

Il semble que les TPE vont disparaître avec la nouvelle réforme du bac, au profit du « Grand oral », épreuve lors de laquelle les candidats auront à justifier en quoi le sujet choisi (lié à l'un des deux enseignements de spécialité suivis

en Terminale) constitue une question vive et quelles en sont les implications dans le monde.

Nous pensons donc qu'il nous faut plus que jamais continuer à promouvoir l'espéranto et ses multiples enjeux auprès des lycéens pour éveiller leur curiosité, les intéresser et faire naître chez certains d'entre eux l'idée de choisir un sujet pour le « Grand oral » de l'ordre de celui évoqué lors du TPE ci-dessus.

La commission Espéranto-au-bac

<https://www.facebook.com/EspertoBac>





## De jeunes espérantophones ont joué un rôle prépondérant lors d'une réunion de l'ONU

**P**reuve de l'intérêt grandissant des jeunes pour l'espéranto, une délégation de sept espérantistes a représenté TEJO, lors du Forum des jeunes de ECOSOC, le Conseil économique et social des Nations unies, à New York. Grand succès pour TEJO, Rakoen Maertens, membre de cette délégation a été nommé intervenant principal lors de la cérémonie de clôture, au cours de laquelle ont pris la parole le Secrétaire général de l'ONU, Antonio Guterres, ainsi que d'importants représentants des Nations unies.

Le Forum des Jeunes d'ECOSOC est le forum de préparation du Forum politique de haut niveau pour le développement durable (ANPF). On y prépare et coordonne l'action des organisations de jeunes qui oeuvrent pour les objectifs du Développement Durable.

Rakoen raconte : « Nous avons organisé des réunions avec des membres de haut niveau du secrétariat de l'ONU pour la politique linguistique. Nous avons à plusieurs reprises discuté avec ceux qui élaborent la nouvelle résolution de l'ONU (le document le plus important de l'Organisation, la "feuille de route" en matière de politique linguistique et plurilinguisme). Nous réfléchissons

actuellement à quelques voies pour influencer ce texte et y mettre des affaires favorables à l'espéranto et à nos buts.

Nous avons aussi discuté de l'organisation d'événements parallèles sur la politique linguistique et les barrières liées à la langue, par TEJO mais aussi avec des groupes linguistiques différents (les locuteurs du français, portugais, etc.) Ces événements parallèles peuvent aider à renforcer notre influence et contribuer à ses succès. »

En ce qui concerne son intervention, Rakoen raconte : « L'ONU voulait un récit personnel et inspiré, j'ai donc parlé de communication interculturelle et de compréhension. Juste avant mon discours, j'ai eu le plaisir de rencontrer le Secrétaire général de l'ONU, António Guterres. Plus de 1000 personnes ont écouté mon intervention (les délégations nationales, les ONG), sans compter les auditeurs en direct sur internet. »

À côté de Rakoen Maertens, les autres membres de la délégation de TEJO étaient Francesco Maurelli, Sasha Murr,



Sara Spanò, Marcus Griep, Hans Becklin et Cassidy Walker.

Les remarques finales de Rakoen ont été particulièrement frappantes : « Permettez-moi de terminer par une de mes citations les plus appréciées, par une Australienne autochtone nommée Lilla Watson. C'est l'essentiel de ce que j'ai dit : « Si vous êtes venu ici pour m'aider, vous perdez votre temps. Mais si vous êtes venu parce que votre libération est liée à la mienne, travaillons ensemble. »

Information : *Espéranto pour l'ONU*, Numéro 40, mai 2019

Lire le discours de Rakoen Maertens (en espéranto) sur

[https://www.tejo.org/wp-content/uploads/2019/04/Prelego\\_ECOSOC\\_RakoenMaertens.pdf](https://www.tejo.org/wp-content/uploads/2019/04/Prelego_ECOSOC_RakoenMaertens.pdf)

Le voir en anglais sur [https://www.youtube.com/watch?time\\_continue=492&v=tyrzs8QesAU](https://www.youtube.com/watch?time_continue=492&v=tyrzs8QesAU)

### En bref

#### L'espéranto en Asie est bien vivant


Le congrès d'espéranto Asie-Océanie s'est tenu à Danang (Vietnam) du 25 au 28 avril, avec 250 délégués. Le thème du congrès : *L'espéranto et la diversité culturelle en Asie et en Océanie*. Un très riche programme. Et bien d'autres rencontres : séminaire des jeunes également au Vietnam, rencontres en Iran, en Chine, en Corée, au Japon... et de nombreuses activités.

Info : *Bulteno de KAOEM*, n°104

#### Manuels d'espéranto en kurde et en tadjik

Grâce au soutien de la fondation ESF sont parus deux nouveaux ouvrages dans l'impressionnante série *L'espéranto par la méthode directe* de Stano Marček. Cette fois les langues de référence sont le kurde et le tadjik. C'est la première fois qu'un manuel d'espéranto paraît dans une langue kurde. L'espérantiste iranienne Shler Karimi a fait la traduction.

Info : *EPC*, *Bulteno de KAOEM*, n°104






Baldur en prelegado, Rotterdamo, 2008-07-24

# ESPÉRANTO ET CULTURE(3)

## Baldur Ragnarsson



En préparation,  
les prochains dossiers

LME 604 : Internacia Jaro de  
Indiĝenaj Lingvoj – Année  
internationale des langues  
autochtones

LME 605 : Bunta Esperantujo

**Baldur Ragnarsson estis poeto, ankaŭ en la islanda lingvo, eseisto, recenzisto, tradukisto, organizanto, pedagogo, eksterordinare klera homo, profunde islanda, sed samtempe profunde transnacia. Lingvo serena, sed homo foje perpleksa, kun psiko iom ŝirita.**

**Ni esperas, ke tiuj kelkaj paĝoj helpos vin pli bone konatiĝi kun tiu grava figuro de nia kulturo. Forpasis Baldur, restas lia mirinda verkaro.**

## Pri Baldur

**Probal Dasgupta el Kolkato,  
26/12/2018  
Al Ragnar Baldursson**

Kara Ragnar,

Unue, bonvolu akcepti miajn personajn kondolencojn okaze de la forpaso de via patro. Li ne estis nur via patro, kiel vi scias. Vi kaj li ekrenkontis min en la sama tago, en la sama rejkvavika hejmo, en 1977 (jam ekis via azia aventuro, sed vi estis ferianta en Islando). Tagmanĝis ĉe vi tiutage krom mi ankaŭ la korifeoj Juan Régulo Pérez (kies

eldona entrepreno, Stafeto, sub reunigita mastrumo, tiam ĵus aperigis mian debutan libron *Primico*) kaj Marjorie Boulton. Vi tial jam dekomence konas la itineron de lia mentora kaj pli ol mentora rilato al mi – almenaŭ la bazajn faktojn. Ekzemple vi sendube scias ke interalie “Proceza poeto”, eseo mia pri liaj hermetikaj poemoj – liadezireaperis en 2007 inter la kromtekstoj en *La lingvo serena*. Sed vi certe ne scias ke bengaligo de tiu eseo aperis en 2015 en mia bengallingva libro pri la esperantismo kaj la Esperanta literaturo. La stampo de lia tute malfermkora

preteco transdoni sian fluon al mia tre malsamdevena fluo de vaporo, akvo kaj glacio estas **integra** parto – en **ĉiuj miaj lingvoj**, Ragnar – de mia sinteno al la diverskonsistaj strioj en la poezio kaj la filozofio. Tiu lia stampo, reliefiganta la konsistojn kaj tiuj fonaj dimensioj kontraŭ kiuj ili teatras, etendiĝis al mia tuta laboraro. Eĉ al mia bengallingva verkado. Temis ne nur pri la filozofia enhavo de lia sinteno reliefigita de lia tute unika kaj nete Esperanto-ligita poezia ilaro. Memoru ke la renkontiĝo kun lia poezio kaj kun li kiel homo trafis min meze de mia studenta tempo kaj forte kunmuldis mian pluiron. Lia influo daŭris preter 1977 interalie ĉar li intime parolis kun mi koridore dum la stokholma kongreso en 1980, kaj skribe daŭrigis la mentoran rilaton.

Vi sendube ne aŭdis, Ragnar, ke la nialande prestiĝa *Jadavpur Journal of Comparative Literature* petis de Baldur, kaj en 1981 aperigis, anglalingvan recenzon lian de mia debuta tradukpoe-marano Primico. Dum sia mandato kiel estrarano de UEA, li iniciatis novan komprenon pri la respektivaj roloj de la tradukarto kaj la originala verkado en la Esperanta kulturo. Per siaj tradukoj el la islandaj sagaoj li modele ekzemplis la tradukan fadenon. Krom liaj atutaj poemaroj plej ofte menciataj, lia poezia kajerado en siaj finaj jaroj restos grandioza kontribuo al la unike Esperanta apudmeto de konkrete personaj sindemandadoj kun misteroj fundamentaj kaj tial universalaj. Ne estis hazarda tiu apudmeto en Baldur: li ne nur surpapere, sed en sia vivado, universaligis sian baraktadon kun la misteroj videbligataj de nia plej intima vidalvido kun la memo. Tion ni vidas en lia mentora rilato kun pluraj aliaj literaturistoj de la posta generacio, interalie kun Mauro Nervi kaj Jorge Camacho Córdón. Estas atentindaj liaj komentoj pri la poeta vizio de Camacho; kaj pri lia rolo en la florado de Nervi kiel serioza poeto preskaŭ ĉiuj scias. Baldur ne nur estis granda vidanto; li pretis disponigi sian vidon rekte, persone, al aliaj pli junaj, kaj li tion faradis ne disĉiplige, sed pure

amike, trans la generacioj. Tiun kapablon mi taksas unike valora.

Mi min limigas al kelkaj vortoj pro tio ke la funebraj devoj nun premas sur vin, Ragnar, sed vi certe vidas ke la temo estas neelĉerpebla.

Krom paroli pri la persona kaj artisma dimensioj, estas mia formala devo, Ragnar, diri al vi kelkajn vortojn vice de tiu Akademio de Esperanto, kiu per-

dis dojenon, korifeon, kvankam li sin senescepte prezentadis kiel ordinaran anon de niaj vicoj. En nia nomo, do, mi formale kondolencas al vi, al aliaj familianoj, al tiuj plej intimaj konantoj de Baldur en kaj ekster Islando al kiuj vi povos peri niajn kondolencojn.

Kunfunebas, elkore,  
Via  
Probal Dasgupta, prezidanto,  
Akademio de Esperanto



Baldur kaj familio, Rejkjaviko, 2013-07-26

## Memore al Baldur

**L**a plej impresa persona memoro, kiun mi havas pri Baldur Ragnarsson, datiĝas de 1994, kiam mia edzino kaj mi unufoje vizitis Islandon, volante kuncelabri, ke 50 jarojn antaŭe Islando definitive sendependiĝis de Danlando. Dum tiu vojaĝo Baldur Ragnarsson gvidis nin tra Þingvellir. En unu loko, kie la akustiko estis speciala, li laŭtvoĉe deklamis fragmenton el islanda poeziaĵo. Jam antaŭ tiu vizito, laŭ mia memoro, kiam mi mem estis ekuzinta la komputilon, mi kuraĝis retmesaĝi al Baldur Ragnarsson, demandante lin, ĉu li pretus sendi al mi elektronikan version de sia traduko de la *Sagao de Njál*. Tion li tuj faris!

Ne ofte mi persone renkontiĝis kun Baldur Ragnarsson, sed mi ja aŭdis lin roli en diversaj Universalaj Kongresoj. Li estis kolono, ne nur en la islanda kaj internacia Esperanto-movado, sed ankaŭ en la Esperanta literaturo, originala kaj traduka. Tipa trajto de multaj islandanoj estas, ke ili alte tenas sian propran kulturon, sed ke ili samtempe havas vastan horizonton al la aliaj kulturoj de la mondo. Baldur Ragnarsson estis tia islandano!  
Miaj kondolencoj iras al lia familio, sed ankaŭ al la islanda Esperantistaro kaj al la amantoj de Esperanta literaturo.  
Pacon al lia memoro!

Otto Prytz



# Serene ripozu en Valhalo, Baldur !

**L**a propra kaj patra nomoj de Baldur Ragnarsson tuj enmergas nin en la islandan mitologion.

Baldur en la malnova islanda lingvo: unu el la diaro ASE, ĉefaj dioj de la norda panteono, kiuj simbolas lumon, belecon, junecon kaj amon. Li estas la filo de la ĉefa dio Odin, kiu vivis kun la aliaj dioj en la fortikaĵo Asgard, kaj Valhalo (Valhöll) estas la loko kie la mortintaj meritoplenaj militistoj estas akceptitaj, en la sino mem de Asgard.

La nomo Ragnar aperis en sagao *Ragnar kun vila kalsono* (“Ragnar aux braies velues”), duonlegenda reĝo de Svedio kaj Danlando inter 750 kaj 850. Alia Ragnar estis grafo sub la reĝo Hårek, kiu partoprenis en la unua rabado de Parizo en 845.

Sagao en la propra senco estas rakonto pri islandaj aŭ norvegaj legendoj verkita inter la 12a kaj la 14a jarcentoj. Tiujn Baldur Ragnarsson ŝatis kaj eĉ tradukis en Esperanton, interalie la plej faman el ili: *Sagao de Njal\**, kiu ricevis la OSIEK\*-premion en 2010, kaj tion mi havis la honoron anonci al li. Legi tiun *Sagao de Njal* postulas veran atenton, ĉar ni ne kutimas tiom multe da islandaj nomoj, vortoj, kaj tiaj rakontoj ne plaĉas al ĉiuj, almenaŭ libroforme, sed aliaj verkoj estas tre agrable facile legeblaj kaj ni povas pluki kelkajn el ili laŭ nia gusto.


Inter aliaj liaj tradukoj eblas citi: *Sendependaj homoj\**, pri islandaj kamparanoj el la 20a jarcento, de Halldór Laxness (1902-1998), laŭdire la plej elstara inter la islandaj verkistoj en la 20a jarcento. La libro staras netuŝita en mia ŝranko. Jen legaĵo por iu venonta Eo-Sumoo!

Do, mi pli ŝatus paroli unue pri *La Lingvo serena\**, kiu entenas ĉiujn verkojn de Baldur Ragnarsson ĝis 2007. Post artikoloj pri li, ekzemple de Nicola Ruggiero aŭ de Mauro Nervi, temas pri poemoj kaj eseoj originale verkitaj.

Kiel multaj bonaj Eo-verkistoj, li verkis ankaŭ en sia denaska lingvo.

Li ŝatis ekzemple uzi internajn rimojn laŭ la praislanda sistemo (p. 152)

Verŝas benon bela suno  
sur la teron tra l' aero  
kisas monton dolĉa vento  
blovetante zuman kanton  
Al la maro mi deziras  
gaje kuri por plezuro,  
vidi ondojn laŭe randi  
blankan bordon de la fjordo.



Li celas “insuleton de l’ poeto”, kie “la aromon de poemoj (li) ekstare ĝue flaras”.

Krom islandaj rakontoj jen aliaj temoj: la naturo, la nordaj ondoj, trankvileco por elito.

La serenecon ni retrovas en poemo tre konata: *La Ĉerizarboj de Lucullo*, generalo kiu gvidis sian armeon “kontraŭ Mitridaton la Grandan”, sed pro ribelo de la elĉerpitaj soldatoj, devis reveni ĝis Jonio, kaj:

Poste en Romo li pasigis sian vivon  
kvieta kaj lukse je festenoj kaj libroj,  
mokataj serĉoj kaj esoteraj gusto,  
kultivante amikecojn kaj la artojn  
kaj ĉerizarbojn.

Baldur Ragnarsson estis tre klera. Kiel multaj lernantoj en tiu epoko li scipovis plurajn lingvojn: la islandan, la norvegan, la anglan, la latinan. Tiaj aludoj multas en liaj skribaĵoj. Li vivis “dum kelka tempo en japana hejmo” en la fino de la 70-aj jaroj (p. 446) kaj kapablis prezenti japanajn verkojn, ankaŭ recenzi tradukojn de ĉinaj poemoj de la Tang-dinastio en *La Gazeto\**.

Kiel William Auld, li verkis ankaŭ honore al la amatino: *Odo al mia edzino*, p. 264.

Kaj ricevinte informon pri forpaso de la amiko (p. 299):

Forpasis Auld. La tago ŝajnas stranga  
post vort’ subita kaj silento sekva,  
silento morta post ruliĝ’ lavanga  
tamen serena, ĉar la blanko puras,  
forpasis homo, kies bild’ staturas  
en niaj pensoj alte, vojogvide  
por daŭre krei, same lingvofide.

Mi citas kelkajn mallongajn eseojn:

1. En *La Lingvo serena* troviĝas ankaŭ eseoj, artikoloj aperintaj en diversaj revuoj, ekzemple, sed ne nur, pri Grabowski – la patro de la esperanta poezio, Miĥalski – libera torento katenita, Nikolai Hohlov – vivo kiel senfine kreata poemo, Raymond Schwartz – la serioza humoristo, kaj tiel plu kun ĉiam trafa titolo, pri Szilágyi, Tárkony, Waringhien, Engholm, Boulton, la fratoj Rossetti, Myamoto Masao, John Francis, Hilda Dresen, Clelia Conterno Guglielminetti, ĉiuj tre konataj de legemuloj. Nuntempaj poetoj ne estas forgesitaj: en “Postparolo por *eklipsas* de Jorge Camacho” (2007), li prezentas la gravecon de kronologio kaj loko en la kreado, tiuokaze en la ekzotika Tajvano kaj la hejma Madrido aŭ la emon traduki japanajn tankaĵojn (17 silaboj en tri linioj, sen rimoj. Poste hajkoj estis eĉ pli popularaj). Denove plaĉas al li, ke koncizeco permesas al la leganto “ĝisfini laŭ sia propra kapo la duondi-



ritan” (p. 445).

Kaj jen paĝoj pri *La Infana Raso* de Auld, *Kantoj de Anteo* de Mao Zifu (2007). Ĉio estas agrable legebla, nelonga. Tamen por tiu lasta, li devis teni ĉemane sian plej grandan vortaron, tiom miriga estas “la enciklopedia kono pri la vortotrezoro de la lingvo”. Interesa referenco uzebla por rebati kontraŭ tiuj, kiuj pretendas ke Esperanto ne enhavas ampleksan vortoriĉecon, kaj por rimarki ke nia lingvo, kiu unue fontis el la eŭropaj, nun kapablas disvastiĝi en Azio (same kiel en Sud-Ameriko).

2. Se ni esploras en *La Arto labori kune*, (Festlibro por Humphrey Tonkin)\*, ni trovas tre interesan artikolon lian pri “Humphrey Tonkin, tradukinto de Shakespeare”. Baldur reliefigas kelkajn malfacilaĵojn en la traduk-laboro: “la superreganta unusilaba stilo kreas problemon”, ĉar Esperanto estas esence plursilaba, sed “aranĝo de akcentaj kaj senakcentaj silaboj” sukcesas redoni la

ritmon. En la dua sceno de la unua akto de *La Vintra Fabelo*, Leonto, reĝo de Sicilio, ĵaluzza pro suspektata amafero inter sia edzino kaj Polikso:

(... they are) making practised smiles/ As in a looking-glass, and then to sigh, as 'twere/ The mort o' the deer : O, that is entertainment/ My bosom likes not...! (p. 720).

Ridetoj trapensataj./ Kvazaŭ en spegulon, kaj suspiroj/ Kvazaŭ fanfar' postĉasa – tia traktol' al mia brust' ne plaĉas.

Baldur aldonas interkrampe: “Preciza traduko, ĉar temas pri suspiro kiel la voko de la ĉaskorno anoncanta la morton de la cervo”.

En la traduko de *Henriko Kvina* Baldur admiras la bone redonitan oratoran elstarecon de la reĝparolado al la soldatoj, aŭ la retorikan karakteron de la koruso. Jen instigo al relegado de la fama verko kun la du tekstoj – angla kaj esperanta – enmane.

3. Alian tre interesan artikolon li verkis en *Lingva arto* (jubilea libro omaĝe al

William Auld kaj Marjorie Boulton)\*: *La fono kaj la fronto* (forma kaj signifoporta): *kelkaj konsideroj pri semiotikaj aspektoj de la Esperanta poezio*. La vorto “semiotika” eble ne estas konata de ĉiuj, sed simple temas pri la scienco kiu studas la vivon de signoj ene de socio, socia vivo. Ĉar Esperanto devas esti komprenata de ĉiuj, el tre diversaj kulturmedioj, necesas kontroli, ke elektitaj signoj, metaforoj, resendas al samaj konceptoj, por ke la leganto povu kontribui al la krea laboro de la poeto, ĉi tie Maŭro Nervi:

Fremda en siaj maroj/ veldrivas parolo mia, sed serene(...) trankvile, ni aŭskultas la ritmajn ŝmacojn/ de l'akvo kontraŭ la kareno.

Komprenblas, ĉu ne, ke temas pri komparo de poezikreado kun bildo de ŝipo, neniam nomita. La metaforo estas bele ekspluatata. Komprenble ni estas sur alia kampo ol tiu de la simpla ĉiutaga komunikado, unua celo de Esperanto, sed ne la sola.

4. En *Beletra Almanako*\*, ekde septembro 2008, ni retrovas de li: *Cent dudek kvin jaroj*, (t.e. de post 1887), n° 16, du poemoj el *Laŭ neplanitaj padoj* ĵus eldonitaj de Mondial en 2013.

Aliaj prezentas sian pripensadon pri *Verki poezion en Eo* (n° 3), *Juan Régulo Pérez: pensoj kaj rememoroj*, kvinpaĝa artikolo kun foto de ili ambaŭ en 1971 (n° 10). Tie li substrekas, kiel Régulo “entuziasme, apreze, instige” reagis al promesaj entreprenoj de novuloj” kaj “kiel eldonisto respektis la lingvaĵon de plej diversaj aŭtoroj”. Mallonga dankema letero al Ulrich Lins, en n° 14,



diplomo de OSIEK

●●● estas nur unu el tiuj, kiuj atestas, ke li korespondis kun multaj famkonatoj. La kondiĉoj de la kreado de la teatraĵo *Inuk* (homo, en la inuita lingvo), jam elvokita en la artikolo pri Régulo pli detale aperas en n°17, junio 2013. Ĝi estis verkita de profesia islanda teamo, kaj ludata tra diversaj landoj en Skandinavio, Eŭropo, Sud-Ameriko, entute 180 fojojn kie la lingvo ne estis komprenata, kaj poste tradukita de unu el la aktoroj, por esti ludita en la Rejkjavika UK de 1977. La kvin geaktoroj studis la kutimojn de tiu popolo, vojaĝis al Gronlando, dancis kun gejunuloj... kaj Baldur ekzercis ilin en la esperanta teksto.

En n°20 (junio 2014) jen kvar poemoj, el kiuj:

Ĉu venis la tempo?  
Pasis la tagoj  
kiam la matenoj salutis min  
per vortoj pretaj por poemoj  
Pasis tiuj matenoj  
kiam la korvoj de Odino  
vizitis min regule  
portis al mi energion  
portis al mi memfidon  
portis al mi ambicion  
Ĉu jam venis la tempo  
ke mi sekvu ilin al Valhalo  
por renkonti ilian Mastron?




Ĉe Belartaj Konkursoj, Roterdamo, 2008-07-24.

Baldur Ragnarsson naskiĝis en 1930 kaj forpasis la 25-an de decembro 2018, 88-jaraĝa. Li instruis en gimnazio, estis lerneja ĉefinspektoro. En la Esperanto-medio li agis kiel prezidanto de la islanda asocio (IEA), redaktoro de

*Norda Prismo*, membro de Akademio de Esperanto, prezidis la Belartajn Konkursojn de UEA kaj, post la morto de Auld, estis proponita por ricevi la Nobel-Premion (2006-2018).

Anne JAUSIONS



### Cititaj verkoj kaj akronimo

*Sagao de Njal*, traduko, 358 p., FEL, Belgio, 2008

**OSIEK**: Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj  
*Sendependaj Homoj*, Halldór Laxness, trad. Baldur Ragnarsson, 479 p., Mondial, NY 2011

*La lingvo serena* (plena originala verkaro), 800 p., Edistudio, Pisa 2007 (ĝi enhavas la du ĉefajn poemarojn: *Ŝtupoj sen nomo*, Stafeto, 1959; *Esploroj*, Stafeto, 1973)

*La Gazeto* n°137, 15 jun 2008, organo de OSIEK

*Lingva Arto* (jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton), 217 p., UEA, Roterdamo, 1999

*La Arto labori kune* (Festlibro por Humphrey Tonkin), 901 p., UEA, Roterdamo, 2010, pp. 720-727

*Beetra Almanako* N° 1, 2, 3, 5, 10, 12, 13, 14, 16, 17, 20 (de septembro 2007 ĝis junio 2014)

## Omaĝo al Baldur Ragnarsson dum la UK

**O**rganizi kunvenon omaĝe al Baldur Ragnarsson ne estis tute facila afero, des pli kiam mi konstatis, kiom malmulte mi konis lin. Persone mi renkontis lin kelkfoje, sed por tiel diri de fore. Mi vidis nur eksteran surfacon. Aŭdi iun, kiu parolas ĉe podio, donas nur tre supraĵan impreson pri homo. Evidente necesis trovi homojn, kiuj konis lin de pli proksime, studi lian biografion kaj enprofundiĝi en liaj verkoj. Mi celis, ke la kunveno ne estu didaktika sed gustumiga, tiel ke ni pasigu kune momenton rememore al Baldur. Materialo abundegis, estis malfacile elekti. Mi ŝatintus vagi laŭ neplanitaj padoj, sed kadre de la kunveno, ni devas tamen plani niajn paŝojn tra la multaj ŝtupoj (sen nomoj) de la kongresejo, apud fontoj nevideblaj.

Humphrey Tonkin havis la ŝancon kunlabori kun li diversmaniere, ekzemple kiel estrarano de UEA aŭ kiel kunlaboranto por la Belartaj Konkursoj. Post iom da islanda muziko, li enkondukis la sesion rakontante pri sia konatiĝo kun Baldur, kaj poste legis leteron de la filo Ragnar, okaze de la forpaso de la patro.

Je tiu okazo, pluraj poetoj tuj verkis ion, kiel ekzemple Miguel Fernández, la aktuala prezidanto de la Belartaj Konkursoj, aŭ Nicola Ruggiero, kiu vivis plurajn jarojn en Islando kaj bone konis Baldur. Vidbendo lia bedaŭrinde ne estis bone aŭdebla.

Tuj skribis al Ragnar Baldursson probal dasgupta, prezidanto de la Akademio (vidu en tiu ĉi numero). Li tiam aldonis pluajn personajn rememorojn dum lia vizito ĉe la familio. Interese aŭdi kiel la juna Baldur eksciis kaj entuziasmiĝis pri la lingvo:

Mi havas longan verkistan karieron ankaŭ en la islanda lingvo, sed mia Esperanta verkisteco estas al mi pli kara. Mia sperto de lernado de Esperanto estas simple la jena: nenio povas anstataŭi intereson, jes entuziasmon, en lernado de lingvo. Mi ne havis instruiston,

mi lernis la lingvon en izoleco, per lerno-libro malgranda, gramatike kaj literature orientita, malnaiva, fidanta al plena sindediĉo de la lernanto.

<http://www.everk.it/index.php?id=33.152.0.0.1.0>

Lia unua poemo estis ampoemo al la lingvo, soneto titolita *Al Esperanto*, kiu aperis en la tiutempa revuo *Voĉo de Islando* (1950). Tiu poemo estas bona atesto pri tio, kiel Esperanto povas tutkapti senteman junulon:

Mirinda Esperanto, amlingvo de l'jarondo,  
kreonta homfratecon per klaro fundamenta,  
al paco procedanta en firmo ĉirkaŭventa,  
homaron kondukanta al frata komprenado.

Sekvis prezento de personaj rememoroj de Otto Prytz (vidu en tiu ĉi numero), kiu poste legis la poemon: *Verŝas benon brila suno...* zorge respektante la specialan ritmon laŭ la praislanda sistemo de internaj rimoj.

Baldur estas por ni granda poeto, sed kiu scias, ke Kalocsay malakceptis prefaci lian poemaron? En 1966 Humphrey Tonkin estis en Hungario (pro la UK en Budapeŝto), kaj tiam li decidis viziti Kalocsay; li raportis interesan diskuton pri tiu stranga poeto el Islando...

La poemoj de Baldur havas grandan diversecon de temoj, kaj ankaŭ diversecon de formoj.

Oni legis el *Esporoj: La ĉerizarboj de Lucullo*. Poste la stilo evoluis al hajkecaj formoj, kiel en *Sezonoj*.

Baldur estis ankaŭ eseisto. Kaj li montris tute apartan interesiĝon pri la novaj poetoj, kiel ni vidas ekzemple en la postparolo por *Eklipsas* de Jorge Camacho.

Humphrey Tonkin admiris la organizan kapablon de Baldur. Kaj amuze, ke en liaj poemoj, foje li parolas pri la movado, ekzemple en *Prepozicioj (La fontoj nevideblaj)*.


La ligoj inter poetoj estis fortaj. Marjorie Boulton enkonduke al *La lingvo*

*serena* verkisverkis *Etaj pensoj ankaŭ ega kolekto*. Interese, ke en *La fontoj nevideblaj*, en la titoldona poemo, Baldur verkas pri tio, ke W. Auld donacis al li libron de Kalocsay antaŭ 50 jaroj... Suveniroj kaj nuntempo, jen esenca enhavo de liaj lastaj poemoj, ekzemple Klopodo (Momentoj kaj meditoj), Fragmentoj (Laŭ ne planitaj padoj), Infanoj (La neceso akceptebla).

Aldone al la jam menciitaj kontribuintoj bele legis la tekstojn Said Baluĉi, Wera Blanke, Michela Lipari, Brian Moon, Vesna Staniĉić-Burchards, Spomenka Ŝtimec.

Se li ĉeestus, kion Baldur dirus en la fino de tiu ĉi kunveno? Eble, ke flugu Kajto! La konata grupo kantis dediĉe al la poeto novan kanzonon *La universala arbo* kaj tiel agrable kaj emocie finis la kunvenon.

Claude Nourmont



### En la libroservoj

Kelkaj haveblaj verkoj estas cititaj fine de la artikolo *Serene ripozu en Valhalo!*

Aldone haveblas liaj kvar lastaj poem-aroj:

*La neceso akceptebla,*  
*La fontoj nevideblaj,*  
*Laŭ neplanitaj padoj,*  
*Momentoj kaj meditoj.*





Fendego de Þingvellir, Islando



Buso en dezerto, Islando



Vilaĝaj domoj, Islando



Simbola plastikaĵo en Rejkjaviko

## La Filozofio

Verkis Baldur Ragnarsson  
Francigis Silĉjo (Sylvain Barrier)

Sur monto kruda kabanaĉo kaŭras  
skuita jam de mil muĝantaj ŝtormoj  
dum longaj jaroj for de homa loĝo,  
kranaspekta: grotas la fenestroj  
simile okulkavojn, dento-nude  
rikanas monden ventmordita pordo.

Silente post la ventfajlita pordo  
fantoma nigro kuntiriĝe kaŭras  
dum la taglumo videbligas nude  
l' internan ejon, kiun skrapis ŝtormoj  
libere fajfegintaj tra l' fenestroj  
antaŭe kiuj montris pri homloĝo.

Ne plu kabanon vivopulsa loĝo  
okupas vigle post pentrita pordo,  
kandeloj malaperis el fenestroj,  
la kato antaŭ fajro ne plu kaŭras,  
rifuzas ŝirmon kontraŭ frapaj ŝtormoj  
kaduka domo, impresanta nude.

Mi tremas, ĉar mi jam staranta nude  
nun estas antaŭ l' ejo de praloĝo  
dum min trapikas la kruelaj ŝtormoj,  
Mi vidas time, kiel antaŭ pordo  
spirito mia en teruro kaŭras  
dum ekrikanas en malic' fenestroj.

Timante mi rigardas tra l' fenestroj  
en la internon senornaman nude,  
enrampas pene, en angul' ekkauŭras.  
Denove ekokupis homa loĝo  
kabanon forlasitan, -- ekster pordo  
daŭrigas sian furiozon ŝtormoj.

Tra nokta sovaĝej' blovegas ŝtormoj,  
reziston ne plu faras la fenestroj  
nek de l' kabano la kaduka pordo.  
La vintro senindulga dentonude  
kolere grincas pro la nova loĝo  
de mi tremanta, kiu kaŝe kaŭras.

Dum muĝas ŝtormoj mi inerte kaŭras  
en nude vaka lok', sen kuna loĝo,  
post difektitaj pordo kaj fenestroj.

## La Philosophie

Un fruste abri sous les sommets tapi  
sapé déjà par mille hurlants orages  
depuis longtemps n'a plus un habitant ;  
comme en un crâne, les caves fenêtres  
dessinent des orbites, dents à nu  
ricane au monde, face au vent, la porte.

Un noir fantôme, au dos de cette porte  
cible du vent, ramassé, se tapit ;  
dans les rayons du jour on voit, tout nu,  
le cœur du lieu râpé par les orages  
sifflant fort, librement par les fenêtres  
qui autrefois montraient les habitants.

Mais la cabane n'a plus d'habitant  
vivant derrière sa coquette porte,  
ont disparu chandeliers des fenêtres,  
le chat au coin du feu n'est plus tapi,  
d'abri n'offrant plus contre les orages  
le vieux taudis impressionne, tout nu.

Et je frémis, car maintenant tout nu  
je suis devant ce lieu sans habitant  
alors percé par les cruels orages,  
Je vois plein de peur, que devant la porte  
dans la terreur est mon esprit tapi  
tandis que rien, mauvaises, les fenêtres.

Je glisse un œil craintif par les fenêtres,  
regarde l'intérieur austère et nu,  
y rampe avec peine, au coin me tapis.  
Occupe de nouveau un habitant  
l'abri délaissé -- derrière sa porte  
s'acharne la colère des orages.

Dans la sauvage nuit, souffle l'orage,  
sans plus de résistance des fenêtres  
ni, pour la cabane, la vieille porte.  
L'hiver est implacable et, les dents nues,  
grince de rage vers cet habitant,  
moi qui, tremblant, caché, me tiens tapi.

Hurlent les orages, mais je me tapis  
dans le lieu tout nu, sans autre habitant,  
derrière la porte, les vieilles fenêtres.

Afable disponigita de Nicola Ruggiero, de ALdE



## Raporto

# Cent homoj por la centa: surpriza kunkongreso en Dovro

**S**urpriza estis la loko. Ni ne trovus ĝin, ĉar kiel ofte mankis eksteraj indikoj kun flagoj aŭ ŝildoj. Tute diskrete la kongresejo staris sur monteto, kun bela alrigardo al la ĉirkaŭaĵoj. Ŝajnis esti kvartala kultura centro, ĉefe por infanoj, kiujn oni atentigu pri lavado de la manoj, kaj pri varmegeco de la akvo. Ĉi tiu Arko de Noa akceptis diversajn ekzemplerojn de la esperant-ista faŭno.

Nur iom post iom ni malkovris, ke ĝi estas ia religia centro. Dimanĉe ni tute ne uzis ĝin, kaj fine lunde kiam ni vidis grandan krucon en la ĉefa salono ni komprenis, ke ĝi estas preĝejo! Kaj se oni ne jam rimarkis, ne eblis ne atenti, ke Bertilo Wennergren forportas la lignan krucon antaŭ ol starigi la instrumentojn por la koncerto... Pro tio la multaj hezitoj de la ĉeforganizanto akcepti ne-kaŝitan kunsidon de ATEO (dum estis en alia loko ekumena diservo sur la programo, sed laŭdire neoficiala...).

La akcepta bufedo estis bongusta, abunda kaj varia, kun bonaj trinkaĵoj kaj amikeca neforpuŝo de la homoj je la oficiale indikita horo. La prizorgantoj de la loko estis tre afablaj kaj helpemaj. Sed ofte ŝanĝiĝis la indikoj, kie okazas kio... Kvankam la ejo ne estis granda, ne ĉiam estis klare, kie okazas la manĝo, kiu prelego aŭ koncerto okazas kie, kaj kiam, do oni iom vagis ĝis kiam oni troviĝis en la ĝusta loko en la ĝusta

horo. Oni devas laŭdi la organizantojn pro la paperŝparemo, tute ne estis kongresaj dokumentoj, sed aliflanke la enreta programo ne estis ĝisdatigita... Oni devis serĉi la panelojn, kiuj montras la aktualan skemon, sed prefere oni rerigardu poste, ĉu ne ŝanĝiĝis io intertempe.

Kaj nun tute malaperis la programo de la retejo... kaj do nur el miaj magraj notoj mi povas plukomenti ĝin.

Tre interesaj estis la prelegoj de Bertilo Wennergren, kaj des pli la diskutoj (du aliaj akademianoj ĉeestis). Temis pri gramatiko kaj surprizaj decidoj de la Akademio, kaj pri uzado de Esperanto en familioj. Estis diskutrodo pri Briteliro (ne ĉiuj estis kontraŭ la forlaso!), pelmele mi notis filmon pri la vojaĝado en landoj sud-afrikaj de Jean-François Cousineau, kvizon, prezenton de retejo uea-facila, prezenton de projekto en Tanzanio.

Abundis elstaraj koncertoj. Al Martin Wiese aldoniĝis Bertilo. Al Bertilo kaj Birke aldoniĝis Gavan. Ni ĝuis bonkvalitan muzikon! Sed post malfruaj koncertoj, kie manĝi? Ne estis proponita servo por la vesperoj (nur tagmeze estis la ebleco), estis neniu restoracio aŭ trinkejo en la kvartalo, do la sola solvo estis manĝi en la hotelo reveninte el la vespera programo. Tamen la restoracio fermiĝis relative frue, do foje ni devis foriri (malafable por la artistoj) antaŭ la fino de la programo.

Pri la libroservoj ni notu, ke ankaŭ estis haveblaj senpagaj brokantaj libroj. Bona iniciato.

Parto de la nova estraro de Esperanto-France en Dovro.



Prelego pri "Hejma lingvo"



Koncerto de Martin Wiese

Jubileo de la brita asocio: estis la centa kongreso kaj je la okazo estis preparita speciala kuko bela, dispartigita inter ĉiuj partoprenantoj, kun trinkaĵo. Ni jubilee kaj feliĉe tostis!

La partoprenantoj: entute ĉ. 100, el kiuj trideko da francoj, multe pli da britoj, kaj kelkaj belgoj, svedoj, germanoj, luksemburgianoj, unu litovino.

Espéranto-France havis siajn statutajn kunsidojn, kaj i.a. elektis novan estraron. Jen :

Didier Loison	prezidanto
Maurice Juy	vicprezidanto
Sébastien Montagne	kasisto
Jean-Lucien Mazeau	vickasisto
Gilles Tabard	sekretario
Michael Leibman	vicsekretario
Raymonde Coquisart	estrarano

Bona bankedo en agrabla etoso finis la okazaĵon.

Claude Nourmont



## Turneo de Dennis Keefe

**D**e la 4a de novembro ĝis la 8a de decembro 2018, Dennis Keefe vizitis 15 klubojn laŭ zigzaga itinero: Angers, Le Mans, Vannes, Lille, Lyon, Romans, Épinal, Thionville, Tours, Paris, Bourges, Châteauroux, Vendée, Toulouse, Béziers.

Dennis pritraktis multajn temojn dum klubaj kaj publikaj kunvenoj. Ili grandparte estis prilingvaj. Ili grandparte estis prilingvaj. Kial interesiĝi pri lingvoj (La Roche-sur-Yon), *Le chinois et l'espéranto. Une nouvelle vague linguistique après le Brexit et l'ère de Trump?* (Tours), kaj ofte priesperantaj *Kiel reklamadi en nia departemento?* kaj *Kial Esperanto pli taŭgas ol la ĉina lingvo kiel internacia lingvo?* (Châteauroux), Esperanto insulo (Bourges), *Komuna modelo por kompreni la fenomenon esperantistiĝo* (Toulouse, Arras), *Esperanto: kial, kiel?* (Vannes).

Dennis instruis dum kursetoj por klubanoj aŭ interesitoj per sia BEK-metodo kaj filmo de Chaplin en Thionville,

Tours kaj supozeble en Paris, Angers, Romans, kiuj bedaŭrinde ne respondis pri siaj propraj programoj kaj publiko en la petita raporto... Dum la Zamenhofa Tago en Béziers, Dennis prelegis pri sia unua vojaĝo en Ĉinio. En Châteauroux, li intervenis kadre de ateliero pri memoro en **Maison des Seniors** kaj ĉeestis filozofian kurson.

En **La maison des langues** de la universitato de Le Mans, li prezentis Esperanton al 20 studentoj kaj angle kaj hispane; en pluraj klasoj de la privata kolegio-liceo Frassati en Mandres-sur-Vair (Épinal) li parolis pri merkato kaj la angla lingvo. Proksimume 100 lernantoj 12-18 jaraĝaj kaj iliaj instruistoj esprimis sian kontenton pri la (tro kurta) interveno de Dennis.

Iuj kluboj por aranĝi sian lokan programon sukcesis aperigi anonco(j) n en la gazetaro kaj per la urbaj ekranoj (Vannes). Okazis intervjuo en Romans, sed neniu ĵurnalista artikolo atingis nin.

Bona kunlaboro okazis kun diversaj lokaj asocioj aŭ ejoj: en asocia kafejo (Toulouse), en kultura kafejo kun la bela nomo **Le Gueulard** en Thionville, en asocia restoracio (Châteauroux), kadre de la *Lingva Festivalo* de Tours, en la sidejo de Espéranto-France en Parizo.

Pro manko de priaj informoj de pluraj kluboj estas malfacile raporti pri kiom da homoj entute ĉeestis la aranĝojn. Ni jam diris pri pli ol 120 lernantoj-studentoj en du urboj. De 5 ĝis 20 esperantistoj en ĉiu klubo lin renkontis okaze de kluba(j) aŭ publika(j) kunveno(j). El la ricevitaj raportoj ni kalkulis, ke la ne-esperantista publiko atingis proksimume 50 homojn. Kiom da dekoj pliaj ni aldonu el la ne-respondintaj kluboj? Tre certe, Dennis Keefe povos mem pli precize raporti pri tio.

Ĉiuj kluboj (“Bone, tre plaĉis, ĉiuj kontentis”, ktp.) laŭdis la talenton de Dennis por kapti la atenton de la klubanoj, lernantoj kaj iu ajn publiko. Li



Dennis instruas en Nilvange

povas sin esprimi per pluraj lingvoj pri diversaj temoj kiujn li perfekte majstras pro sia longa vivo en diversaj landoj. Dennis (“ege afabla, ni multe ridis” Vendée), respondis al multaj demandoj okaze de ĉiu aranĝo.

Bruno Henry (Thionville) en mallonga artikolo tre bone ilustras la instruistan talenton de Dennis :

“Dennis KEEFE usona esperantisto la 22an de novembro gvidis BEK kurson en la kultura trinkejo **Café Culture Le Geulard** en Nilvange apud Thionville (Moselle). Ni invitis lin por kuraĝigi niajn komencintojn el nia klubo. Tiun celon ni atingis! Dennis miksis en tri grupoj komencintojn kaj spertulojn. Li klarigis al ni ke la kurso konsistas el 5 % ĝis 10 % da instruado kaj alitempe oni

praktikas. Laŭvice ĉiu faris demandon al alia kiun ni prenis el la leciono. Poste ni refaris la samajn demandojn sed la lernantoj devis kaŝi la respondojn kaj respondi laŭ sia memoro. Du spertuloj kontrolis ĉu la grupoj bone laboris kaj ili klarigis gramatikon al la lernantoj. Ankaŭ Dennis uzis senparolan filmon de Charlie Chaplin. Dennis montris iom post iom parteton de la filmo kaj ni devis rakonti la sekvon. Tio estis tre amuza kiam ni malkovris la sekvantan parteton.

La kurso daŭris de la 9a ĝis la 17a kun paŭzo por tagmanĝi. La kafejestroj Sonia kaj Maŭro kuiris italajn nudelojn kun kokidaĵo kaj kunmanĝis kun ni. El proksima Luksemburgio Claude kaj Brian venis tagmanĝi por renkonti Den-

nis kaj nin. Posttagmeze kelkaj klientoj kaj muzika grupo kiu prepariĝis por la sekvanta programo aŭdis Esperanton. Eĉ Maŭro la kafejestro reklamis por Esperanto!”

Kiel skribis Katja Boen (Lille, kie Dennis bedaŭrinde portempe malsanis kaj ne povis interveni), “Tiuj prelegturneoj ĉiam estas gravaj momentoj por niaj kluboj”. Ni aldonu des pli kiam turneas talenta kaj homama preleganto! Dennis, tre komunikema, kreis bonan etoson kun ĉiuj kaj tre certe ne estos forgesita de la junaj lernantoj kiuj lin aŭskultis.

Ĉar Dennis Keefe nun loĝas en proksima Hispanio, ni esperas, ke li onte povos jese respondi al novaj invitoj de la franca movado! Dankon al vi, Dennis!

Yves NICOLAS

## Prelegvojaĝo de Alan Neven Kovačić

**A**lan Neven Kovačić prelegvojaĝis de la 15a de januaro ĝis la 17a de februaro. Dum tiu monato, li vizitis 18 klubojn laŭ jena sinsekvo: Tilff kaj Bruselo en Belgio, Thionville, Amiens, Périgueux, Brive, Limoges, Châteauroux, Bourges, Angers, Saint-Nazaire, Saint-Malo, Hérouville-Saint-Clair, Avranches, Paris, Bourg-en-Bresse, La Ciotat kaj Béziers. Malgraŭ tiu zigzaga itinero, fervojista striko kaj valizo pli kaj pli peza pro akiro de turistaj flugfolioj kaj libroj, Alan restis bonfarta de la komenco ĝis la fino, kvazaŭ ĉiu etapo provizus al li plian energion.

Pli ol 200 (bedaŭrinde iuj kluboj pri tio ne raportis) esperantistoj parolis kun li aŭ ĉeestis prelegon. Sesdeko da neesperantistoj aŭskultis lin dum publikaj prelegoj aŭ interveno en lernejoj. En Périgueux, li parolis en la franca pri la slavaj lingvoj al 30 lernantoj de liceo. En la sama liceo, li parolis kun lernanto kiu sekvas kurson kadre de la projekto

*Esperanto por la abiturienta ekzameno.*

En Parizo, li kunvenis kun 3 lernantoj de Esperanto, 11 jaraĝaj, kies instruisto estas Aleks Clabaut. Alan gvidis ankaŭ kurson laŭ la zagreba metodo ĉe minimume tri kluboj.

Laŭ la raportoj, 10 prelegoj estis publikaj kaj 8 nur enklubaj. Oni ne informis nin pri gazetaj raportoj. La temoj pritraktis historion, turismon, nunan situacion en Kroatio. Venis pozitivaj kritikoj “Alan estas ĉiam bonhumora”, “Tre alloga prelego”, “resume, tre rekomendinda preleganto”, “tre agrablaj momentoj”, “interese”, “plaĉis/tre plaĉis”. Kelkaj kluboj ŝatis ankaŭ, ke la interveno okazu en la franca por la publiko ne esperantista kiu kelkfoje venis por prepari sian vojaĝon al Kroatio. Aliaj raportis, ke “mankis diaporamo”, “tro longe, tro zigzage”. Iuj kluboj volintus pli da tempo, aliaj, ke Alan estu pli konciza.

Kunlaboro kun frataj asocioj okazis diversloke: *Forum des Citoyens*, kiel

ofte, apud Thionville, CIRA en Limoges, Esperanto kurso kadre de la Inter-Aĝa Universitato de Basnormandio en Avranches, lernejoj en Périgueux kaj Parizo.

Scivolema, Alan ŝatis turismadi en ĉiu loko kaj starigis multajn demandojn. Tio plaĉis al la gastigantoj, sed iuj ŝatintus, dum privataj konversacioj, malpli ĝisoste defenditajn vidpunktojn pri eksterturneaj temoj.

Konklude: Alan Neven Kovačić faris longan turneon kaj estis tre disponebla por renkonti kaj helpi novbakitojn aŭ afable respondi al multaj demandoj pri sia lando dum publikaj kunvenoj, ĉu en Esperanto ĉu franclingve. Tiuj publikaj aŭ enklubaj intervenoj ĝenerale plaĉis kaj oni povas taksi ilin tre pozitivaj.



Yves NICOLAS



### Universala Kongreso



## Eklaboris nova estraro de UEA

**E**n sia kunsido dum la **104-a Universala Kongreso**, la komitato de UEA elektis novan estraron por gvidi la asocion dum la venonta trijara periodo. Kun la ĉeesto de 35 komitatanoj A, reprezentantaj la aliĝintajn landajn kaj fakajn asociojn, kaj 5 komitatanoj B, elektitaj de la individuaj membroj, la komitato kompletigis sin per la elekto de 9 komitatanoj C: Duncan Charters, Andreas Diemel, Mark Fettes, Huang Yinbao (trezoro), Dennis Keefe, Zsófia Kóródy, François Lo Jacomo, Stefan MacGill kaj Rakoen Maertens.

Estis du kandidatoj al la prezidanteco, Duncan Charters el Usono, kaj Fernando Maia Jr el Brazilo. Du voĉdonadoj estis necesaj por elekti prezidanton, ĉar la elekto postulas pli ol duonon de la voĉoj. En la unua voĉdonado Maia ricevis 21 voĉojn kaj Charters 20 kaj krome estis unu voĉdonilo kontraŭ ambaŭ kandidatoj, do Maia ne ricevis pli ol duonon de la voĉoj. En la dua voĉdonado Charters ricevis 22 voĉojn kaj Maia 21 voĉojn. Do fine venkis Charters.

Al la estraro estis elektitaj Huang Yinbao (trezoro), Aleks Kadar, Fernando Maia, Orlando E. Raola, Jérémie Sabiyumva, So Jinsu kaj Amri Wandel.

La kunsido daŭris kun la decidoj pri la statute difinitaj postenoj de vicprezidantoj kaj ĝenerala sekretario.

La nova estraro de UEA dividis siajn taskojn dum sia merkreda kunsido:

Prezidanto: Duncan Charters

kunordigo, strategio, instruado, rilatoj kun ILEI

Vicprezidanto: Fernando Maia Jr

Centra Oficejo, statuta reformo, eksteraj rilatoj (krom Unesko), Ameriko, rilatoj kun TEJO, rilatoj kun membro-organizoj

Vicprezidanto: Huang Yinbao (trezoro)  
financoj, Unesko

Ĝenerala Sekretario: Aleks Kadar  
administrado, ĝemelaj urboj, Esperanto-centroj, Eŭropo, revuo Esperanto

- Orlando E. Raola  
kulturo, kongresoj, biblioteko, eldonado, esploro kaj dokumentado, terminologio
- Jérémie Sabiyumva  
Afriko, aktivula maturigo
- So Jinsu  
Azio, Oceanio, informado kaj Amikoj de Esperanto
- Amri Wandel  
sciencia kaj faka agado, Mez-Oriento kaj Norda Afriko

Nun la estraranoj aktive informas en la listo

[komitato-de-uea@yahogroups.com](mailto:komitato-de-uea@yahogroups.com) (legebla de ĉiuj membroj) pri siaj laborplanoj. Rimarkinde estas, ke pluraj eks-estraranoj akceptis esti komisiitaj pri taskoj, kiujn ili (ek)plenumis en antaŭa(j) mandato(j), ekzemple Emilio Cid, Mark Fettes, Stefan MacGill. Komisionoj eklaboras. Jam estas invito por la 51-a Malferma Tago en la Centra Oficejo, kiu okazos sabate, la 30-an de novembro 2019, de la 10-a ĝis la 17-a horo <https://www.facebook.com/events/2226908600933748/?ti=cl>

Pri la evento aldone legeblas ĉe la Eventa Servo de UEA kaj TEJO:

<https://eventaservo.org/eventoj/iWnVaxUy-gORJVvBq>

## Sveda ministro salutas la

**Amanda Lind (MP), sveda kulturministro, sendis filmeton por saluti la kongreson.**





## Eĥoj pri la UK

**K**iu volas eĥojn el la UK, povas rigardi ĉe la retejo de UEA, kaj tute aparte ĉe La Saltejo, ĝia kongresa kuriero.

Ofta temo estis: la programŝanĝoj. Iom komplekse ĉar la ĉefa programo okazis en du ejoj ne tre foraj,



tamen ne apudaj, kaj oni devis kalkuli tempon por salti de unu ejo al la alia. Kaj kiel kutime, tro da koincidoj. Sed neeviteble en tia grandioza aranĝo.

Multaj debatoj (ne nur en la komitato) rilatis al la nuna situacio en la Centra Oficejo, kie estis maldungoj kaj reduktado de laborhoroj por iuj oficistoj. Streĉa situacio, malfacile solvebla per simplaj paŝoj. La nova estraro klopodas sobre trakti la aferon, kaj proponi akcepteblajn solvojn.

Venis multe malpli da partoprenantoj ol la organizantoj atendis, kaj tiel, malpli da financaj rimedoj. Sed ni rigardu pozitive pri la UK. Ĝi estis bela

kongreso. La partoprenantoj tre ĝuis ĝin. En la 15 programeroj de la *Kleriga Lundo*, kie estis organizitaj tute novtemaj sesioj, ĉiuj salonoj estis plenplenaj, kaj la ĉeestantoj (kaj gvidantoj) estis tre kontentaj. La prelegoj de la Kongresa Universitato allogis bonan publikon. Pri la artaj programeroj ĉefa problemoj estis plenpleneco de salonoj. Mi ne daŭrigu listigi la tuton – prelegoj pri Finnlando, komitataj forumoj, sesioj pri la kongresa temo, esperantologia konferenco, ekskursoj kaj malkovro de la ĉirkaŭaĵo... kaj multaj aliaj eroj. Indis partopreni.

Claude Nourmont

## kongreson en Esperanto

Jen la teksto :

*Saluton, estimataj kongresanoj!*

*Mi estas Amanda Lind, sveda ministro pri kulturo, demokratio, sporto kaj naciaj minoritatoj.*

*Kiel ano de Miljöpartiet (la sveda verda partio) kaj la tutmonda verda movado, kaj vivanta naturo kaj floranta kulturo estas valoroj tre proksimaj al mia koro.*

*Elkorajn bondezirojn mi sendas al la Universala kongreso. Renkontiĝoj kaj babilado inter homoj estas fundamento por vigla demokrata evoluo. Dankon al vi ĉiuj en la Esperanto-movado pro viaj kontribuoj por instigi komunikadon trans lingvaj kaj naciaj limoj. Ni estu unu homaro sur ĉi-unu terglobo!*

*Amike, Amanda*

<https://tinyurl.com/salutosveda>

### Résolution du 104<sup>e</sup> Congrès Mondial d'espéranto à Lahti, Finlande

**Le 104<sup>e</sup> congrès Mondial d'espéranto, réuni à Lahti du 20 au 27 juillet 2019, avec 917 participants de 57 pays,**

après avoir débattu du thème *Nature vivante – culture florissante* au cours de trois sessions, plusieurs conférences et autres réunions et excursions dans la région de Lahti ;

et avoir pris note que ce thème s'accorde avec la récente désignation de Lahti comme capitale verte de l'Europe 2021 ;

soulignant le lien entre ce thème et l'*Année Internationale des Langues Autochtones* que les Nations Unies et l'Unesco célèbrent en 2019 ;

déclare qu'une nature durable va de pair avec une société durable, et une société durable avec un traitement égalitaire des personnes, y compris en ce qui concerne la langue ;

avertit que les processus actuels de mondialisation économique menacent tant la durabilité de la diversité culturelle que la biodiversité ;

souligne que le mouvement espérantiste, en tant que mouvement pour une autre forme de mondialisation fondée sur le respect et la valorisation de la diversité linguistique et culturelle, est en même temps un mouvement pour le développement durable au sens large ;

signale que le mouvement espérantiste, tant par des actions individuelles que par des programmes associatifs, travaille déjà à équilibrer les relations entre nature et culture, notamment par une éducation interculturelle, une solidarité entre individus, et un soutien à des initiatives locales en vue du développement durable ; et

appelle au rapprochement et à la collaboration entre le mouvement espérantiste et d'autres organisations et mouvements pour la protection et le développement des cultures locales et des milieux naturels à l'échelle mondiale.

## La unua Esperanta Turneo

Diversaj nacioj kaj kulturo, sed nur unu komuna lingvo – Esperanto

**P**asintjare, septembre, dum komuna veturado al Złotoryja por prezenti en mezlernejo Esperanton, ekestis nia ideo rekomendi Esperanton en diversaj landoj pere de programo, kiu estos prezentata fare de eksterlandanoj nur Esperante kun traduko en la lokan lingvon. Ni deziris montri, ke por viziti diversajn landojn kaj ekkoni iliajn kulturon, historion kaj homojn sufiĉas koni nur Esperanton.

Post kelkmonataj preparoj, venkinte multajn malfacilaĵojn, ni komencis realigi nian programon ĉi-jare. Ĝi komenciĝis en Pollando la 4an de junio kaj finiĝis la 12an de junio. La unua etapo estis Herzberg am Harz, la Esperanto-Urbo, en Germanio, kaj la dua estis Fleury-les-Aubrais en Francio. Ni preparis abundan programon kun muziko, dancoj kaj prelego pri Malsupra Silezio — sudokcidenta regiono de Pollando — kaj ĉefe pri ĝia ĉefurbo, Vroclavo, kaj ankaŭ polan manĝaĵon. Pro tio la partoprenontoj, kiuj ankoraŭ

ne konis Esperanton, intense lernis ĝin kaj penis konstrui konvenan scenan programon.

La ideo de nia turneo estis ne nur venigi la lokajn esperantistojn, ĉar ne temis pri klasika E-aranĝo, sed ĉefe pri diskonigo de Esperanto al larĝa publiko per praktika ekzercio: vidigi kaj aŭdigi Esperanton, kaj do pruvi al neesperantistoj, ke la internacia lingvo vere funkcias. Konante ĝin, ni facile interkompreniĝas kun homoj el diversaj landoj sen koni ilian lingvon.

La vojaĝgrupo estis diversaĝa (gejunuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj) kaj konsistis el personoj loĝantaj en Lubin, Vroclavo kaj Góra (malsuprasileziaj urboj, en kiuj aktivis esperantistoj). La organizanto, la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, sukcesis ricevi monsubtenon de la urbo Vroclavo (pollingve: Departament Prezydenta Wrocławia — Biuro Współpracy z Zagranicą), de la fondaĵo KGHM Polska Miedz, kaj de francaj esperantistoj.

### Herzberg am Harz

Ni elektis Herzberg kiel la unuan etapon, ĉar ni ne sukcesis prepari nian restadon kaj prezenti nian programon en alia germana urbo. Tamen la elekto montriĝis perfekta, kvankam la distanco inter Herzberg kaj Fleury-les-Aubrais estas tre granda. Nian programon ni prezentis en granda salono de la bela hotelo Zum Pass en Herzberg-Sieber, kie ni ankaŭ loĝis. Nia alveno al Herzberg estis preskaŭ lastmomente interkonsentita kun lokaj esperantistoj, kaj do ne estis multe da tempo por prepari grandan reklamon en la regiono, sed malgraŭ tio la hotelsalono estis plenplena. Pleniĝis ĝin ĉefe la geamikoj de Małgosia Komarnicka, kiu pasigis en Herzberg 10 monatojn kadre de Grundtviga programo antaŭ 10 jaroj. La geamikoj invitis siajn familianojn, konatojn kaj najbarojn por partopreni la polan programon pere de Esperanto kun traduko en la germanan. La reprezentantoj de lokaj esperantistoj, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, invitis la urbestron de Herzberg, s-ron Lutz Peters, kiu amuziĝis ĝis la fino de la programo. La publiko admiris la dancojn de la pliaĝaj kuraĝigistinoj el la dancgrupo Gracje, la majstran gitarludon kaj pol- kaj esperantlingvan kantadon de la blindulo Wojtek Ławnikowicz kaj la gejunulojn el Góra, kiuj dum nur unu monato kreis la muzikgrupon Na-Raz kaj ellernis multajn E-kantojn.

Danke al la prelego de Małgosia Komarnicka multaj personoj decidis viziti Malsupran Silezion kaj ĝian ĉefurbon Vroclavo. La publiko havis ankaŭ eblon admiru diversajn manlaboraĵojn (belajn kaj elegantajn galanteriaĵojn, korbojn, juvelaĵojn k.a.), kiujn preparis Bożena Zajączkowska el uzita papero, plastaj boteloj kaj plantoj.



la vojaĝgrupo survoje (foto: R. Komarnicki)

Je la fino de la programo la publiko estis regalata per tipa pola manĝaĵo, pri kiu zorgis Ryszard Komarnicki kaj Teresa Sybilak, kaj invitata al komuna dancado kaj kantado.

Nia turneo komenciĝis en amika Esperanta etoso kaj bona prezentado de pola regiono pere de Esperanto.

### Fleury-les-Aubrais

Al Francio ni alvenis vespere la 6-an de junio. Nin bele salutis la urbestro en la urbodomo, sed bedaŭrinde tuj estiĝis problemoj kaŭzitaĵe de neatendita manko de gastigantoj. Tial la dispartigo de la alvenintoj inter lastmomente trovitaj personoj emajn gastigi ilin estigis daŭrajn malfacilaĵojn — ili ekloĝis en lokoj tre foraj unu de alia kaj estis gastigataj de homoj tre favoraj al ni, sed ne konantaj Esperanton.

La sekvan tagon en la urba biblioteko Małgosia prezentis lumbildaron pri Vroclavo kaj Malsupra Silezio kun lerta traduko de Feliks Wandervogel. La loka publiko vere interesiĝis pri tiu prezentado de nia regiono. Sian arton montris ankaŭ la dancistinoj kaj la muzikgrupo, kaj Wojtek entuziasmigis la aŭskultantaron per sia profesia kant-nivelo. Bożena ĉifoje prezentis bildojn el sekigitaj eroj de plantoj, nomatajn pollingve liściaki (foliaĵoj). La publiko, danke al Ryszard kaj Teresa, estis regalita per pola manĝaĵo. Je la fino la franca publiko kaj poloj kune dancis kaj amuziĝis.

Poste bedaŭrinde estiĝis alia problemo: la urbestro iom “preteratentis” nian viziton. Dum la sabata muzikfesto en la urba parko, ni devis akre barakti ĝis la lasta minuto, por ke niaj muzikistoj kaj dancistoj povu aliri la scenejon kaj prezenti sian programon nur dum kelkaj minutoj. Tial la publiko ne povis aŭskulti la belegan voĉon de nia kantisto Wojtek, simple ĉar iu nedifinita organizanto ne konsentis enskribi

lin en sian liston. Tiuj malfacilaĵoj ne devas tamen pensiĝi, ke nia programo fiaskis. Kontraŭe, la dancgrupo Gracje kaj la muzikgrupo Na-Raz eĉ dum siaj kelkaj minutoj mirigis la publikon. Tiuj altkvalitaj minutoj forte impresis la homojn kolektiĝintajn en la parko, kiuj komencis tiam ĝoje amuziĝi, dancante, kaj eĉ provante kanti la refrenon, kion ili ne faris dum la aliaj prezentadoj.

Kvankam ankaŭ la vetero ne favoris nin, dum la sabata festo en la parko Bożena trovis apud sia budo floremulojn kaj reciklemulojn — infanojn kaj iliajn gepatrojn. Krome ni ne forgesu pri la pola kuirarto, ĉar polaj dolĉaĵoj, kolbasoj kaj la pola supo ŝurek ĉie bongustegas al la publiko!



La pola supo, “ŝurek” (foto: E. Richard)

Pro la pluva vetero ne okazis dimanĉa muzikfesto en la parko. Tamen ni renkontiĝis en la urbodomo kun la urbestro de Fleury-les-Aubrais. Ŝi dankis al ni pro nia alveno kaj belega programo, kaj reprezentanto de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado dankis ĉefe pro la eksterordinara gastamo de la francaj familioj, kiuj ne konante Esperanton klopodis krei vere amikan etoson. Wojtek zorgis pri muzika elemento de tiu renkontiĝo.

La plej belaj kaj neforgeseblaj momentoj okazis dum la vizito al bazlernejo, kie Bożena okupiĝis pri infanoj kaj montris al ili, kiel komponi artaĵojn el sekigitaj floroj. Wojtek gitarludis kaj Małgosia, Teresa, Ryszard, Jola kaj la interpretanto Feliks helpis al Bożena. Multaj partoprenantoj en tiu laborsesio vere ekinteresiĝis kaj certe plue trejniĝos. Ĉar ne ĉiuj infanoj povis samtempe partopreni en la laborsesio, alia grupo dancis kun niaj muzikgrupo Na-Raz kaj dancgrupo Gracje. Bela tago, bela etoso dank’ al la sincera partopreno de la gelernejestroj, instruistinoj kaj... kuiristinoj, kiuj preparis la tagmanĝon por ni.

Nian dankon meritas ankaŭ la poldevena grupo de Orléans, Loire-Vistule, kiu ĉiĉeronis nin tra la mezepoka kvartalo de sia urbo kaj havigis al ni interpretistinojn, kiu dum nia vizito al la mirindaj kasteloj en Blois kaj en Chambord kompetente tradukis el la franca en la polan.

Dum la adiaŭa vespero en la kastelo La Brossette ĉe bongusta manĝaĵo kaj kantoj de la muzikgrupo Na-Raz kaj Wojtek, ni longe amuziĝis, rememorante nur pozitivajn momentojn de nia restado. Per valoraj donacoj ni bele dankis al ĉiuj (11 personoj), kiuj okupiĝis pri la preparado de nia alveno kaj restado.

Ni revenis hejmen kun novaj spertoj kaj amikecoj kaj ankaŭ kun sento de memvaloro pri ni mem kiel organizantoj de niaj tre grandaj eventoj, ĉe kiuj laboras nur kelkaj personoj...

Małgosia Komarnicka  
Feliks Wandervogel  
[www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl)





### Forpasoj

#### Daniel Moirand (1941-2019)

##### Profesie instruisto de la rusa lingvo en Lycée Mignet en Aix-en-Provence, Daniel Moirand ŝategis lingvojn.

Mi konatiĝis kun li en la universitato de Aix, kie ni kune lernis la rusan. Li planis vojaĝon per Vespa al Hungario kaj ĉar mi jam korespondis kun hungara esperantisto, Daniel petis, ke mia amiko traduku diversajn vojinformojn. Kiam li lernis Esperanton, mi vere ne scias, sed lerninte la hungaran kaj la turkan, li supozeble facile alproprigis al si la internacian lingvon. Post la emeritiĝo de Michel Duc Goninaz, Daniel Moirand transprenis la postenon en la Universitato de Aix por prepari studentojn al la Esperanto-ekzameno, ĉar tiam Esperanto estis unu el la eblaj fakoj por literatura licenco.

Li ne estis aparte movadema (kvankam li estis sekretario de la LKK por

la kongreso de Espéranto-France en La Roque d'Anthéron), sed multe kontribuis al la Esperanto-vivo per partopreno en Esperanto-aranĝoj. Pluraj supozeble vidis lin ĉu en Katalunio, ĉu ĉe *Mediteranea Esperanto-Semajno*. Li multe kontribuis al nia literaturo per verkado de libro pri akuzativo *Materialoj pri la nuna uzado de la Akuzativo* (eld. FEL, 1990), kie li havigas amason da ekzemploj, kiujn li ĉerpis el tre diversaj lingvo-uzoj.

Li verkis ankaŭ krimromanon *Krimo en Esperantujo*, sed li ĉefe kontribuis per traduko de mejloŝtona franca romano *La Grafo de Montekristo* en du volumoj kaj 1185 paĝoj (eld. FEL, 2010) kun amaso da kromaj informoj pri la tiutempaj Marsejlo kaj regiono, ne parolante pri *La libro de la Mirindaĵoj aŭ la priskribo de la mondo de Marko*



Daniel, dum la 27a IF (Nördlingen, 2010-12-28)

*Polo* (Eld. UEA, 2001), 34a volumo de la serio *Oriento-Okcidento*, iniciatita de UNESKO. Pluraj supozeble aŭdis lin prelegi pri *La 1001 noktoj*, kiun li tradukis sed por kiu li bedaŭrinde ne sukcesis trovi eldoniston (ĝis nun).

Al lia edzino Josiane, kiu ankaŭ estas esperantistino, al liaj du gefiloj kaj lia nepo ni sincere kondolencas.

Renée Triolle

#### Roger Degrelle (1941-2019)

Mi devas diri, ke kvankam mi renkontis lin plurfoje, mi ne vere konis lin. Mi fine malkovris liajn diversajn ecojn kiam je lia forpaso esperantistoj verkis pri li en *La Informilo*, dulingva orient-franca bulteno.

Ege mi miris, kiam forpasan anoncon sendis lia filo. Filo de katolika pastro? Mi supozis pri gugla mistraduko, sed ne: pastro **Roger Degrelle** adoptis du



Roger Degrelle ĉe libroservo, 5a de majo 1984, Munster, Francio. Kongreso (renkontiĝo) de Espéranto-France-Est.

infanojn! Kia bela historio. Lia vivo ne estis tiu de tradicia katolika pastro.

Li eklernis la lingvon kiam li revenis de militservo en Alĝerio. Li disponis je eble 3 liberaj semajnoj, kaj li englutis la 17 lecionojn de la *Racia Kurso* en 17 tagoj. Tuj poste li malfermis kurson en la seminario. En Nancy li longtempe instruis la duagradan kurson, kaj li plenumis diversajn aliajn taskojn (perkoresponda kurso, trapasado de ekzamenoj).

Li kreis la libroservon de Espéranto-France-Est, pri kiu komence la komitato de la asocio ne tre entuziasmis. Plej bele skribis pri li Jean-Luc Thibias, kiu transprenis la laboron pri tiu libroservo. Komence de lia pastra kariero Roger loĝis en socia domo en Tomblaine apud Nancio. Jean-Luc ofte vizitis lin, kaj diskutis pri la libroservo kaj pri aliaj temoj. Li konstatis dum la vizitoj, ke multaj homoj petas lian intervenon: gefianĉoj por prepari la geedziĝan ceremonion, iuj pro ĵus forpasinta famili-

ano, aŭ plej diversreligiaj najbaroj. Foje telefonis ĵurnalisto, foje policano... Li estis ĝisosta esperantisto, sed li aktivis ankaŭ en aliaj movadoj, ekzemple en pacmovado, kio en 1980 estis pli malpli suspektinda en Francio. Li ne kaŝis, ke politike li konsideras sin ĉe maldekstra flanko. Li plurfoje deĵoris ĉe la budo, kiujn esperantistoj starigis ĉe *Fête de l'Humanité*.

Jam en 1982 li vestiĝis ne kiel pastro, sed kiel ordinara viro. Pastro en la koro, ne en la vesto! Ekzistas karieristaj passtroj, li ne apartenis al tiu speco!

En 1988 li estis nomumita paroĥestro en la urbeto Piennes, kaj li estis la sola pastro por granda aro da paroĥoj. Partopreno en esperantaj semajnfinoj fariĝis por li preskaŭ ne ebla. Tial ni ne vidis lin dum la lastaj jaroj.

Kiel ĉiuj mi memoras lian bonhumoron kaj humuron.

Lian ridadon mi ne forgesos !

Claude Nourmont  
(helpe de artikoloj en *La Informilo*, n°185)



### Gaby Tréanton (1920 - 2019)

**Gaby estis batalanto por la paco, tiom en sia agado favore al la lingvo Esperanto, kiom en la asocio “Civitanoj de la Mondo”, kies aktiva ano ŝi estis.** En 1999 tiu eta nelacigebla virino ne hezitis alfronti 45 horojn en buso por instrui Esperanton al infanoj de Gorazde en

Bosnio, kadre de Festivalo por la Paco, kaj pli poste ŝi ankaŭ ekflugis al Brazilo por utiliĝi al la infanoj de la orfejo Bona Espero.

Ĉiam ĉirkaŭata de infanoj, ŝi ŝategis transdoni. Scivolema pri ĉio, pli ol 90 jaraĝa ŝi ne hezitis reveni sur la benkojn de la lernejo por lerni novajn pedagogiojn, dum la internaciaj renkontiĝoj en Pluezek aŭ aliloke. Ĉiam preta amuziĝi kaj amantino de bretona danco, oni vidis ŝin danci, 94 jaraĝa, dum la renkontiĝoj de Pluezek en 2016! Granda vojaĝantino, ŝi partoprenis multajn internaciajn kongresojn. Ŝi ŝategis akcepti, kaj kiam la bretona federacio organizis turneon de eksterlanda preleganto, ĉiam halto estis antaŭvidita en ŝia hejmo, en Saint-Quay-Perros.

Virineto sed grandega elstara virino, ŝi estis ekzemplo de sereneco, de petola gajeco kaj de pasio por la Paco. Ŝi klerigis multajn generaciojn de gejunuloj al malfermado al la aliuloj kaj al la monda lingvo.

Nome de la anoj de la Federacio Esperanto Bretonio kaj nome de ĉiuj esperantistoj, kies omaĝaj mesaĝoj amasiĝas el la tuta mondo, el Rusio, el Ĉinio aŭ el Brazilo, dankon Gaby, dankegon al nia kara Gaby.

**Redaktis Josette, legis Amapola en la franca dum la omaĝa ceremonio, la 10an de aprilo 2019. Multajn aliajn omaĝojn legis esperantistoj kaj aliaj geamikoj de Gaby.**



Gaby kun 90-jariĝa bukedo, 2010, Idar Oberstein

### Libroj

## Kulture kaj nove

**K**iel kutime, kulturaj novaĵoj abundas. Se temas pri libroj, ni ricevis en la sesio *Libroj de la Jaro* dum UK prezenton de varia sortimento da novaj eldonaĵoj, kio invitis tuj iri aĉeti en la libroservo (kie ili rapide elĉerpiĝis).

Jen nur kelkaj eroj plukitaj el la ĉi jara rikolto.

La *IKU-libro* estas aparte bela kaj instruciĉa, kun la teksto de la prelegoj okazintaj dum la Kongresa Universitato en Lahti. Resumoj estas en la angla, franca, finna kaj sveda.

**Bonvenaj simplaj legaĵoj** (tamen ne tiom naivaj) kiel *Vojaĝo de Onia, Japana*, kie Koreino rakontas pri siaj spertoj dum vojaĝoj tra Japanio, en la jaro 2015 trimonate kaj en la jaro 2017 unumonate.

Du **porinfanaj libretoj**: *Rakontoj el la poŝtista sako* de Danuša Dragulová-Faktorová, tradukitaj el la slovaka, kie grave rolas parolanta kato Murko, kaj de

la sama aŭtoro, *La aventuroj de sinjoro Bruetulo*, bonintenca edifa verketo.

**Aperis la kutimaj Raportoj el Japanio** de nia amiko Hori Jasuo, la 22-aj en la serio. Tamen ĉi-foje ne temis nur pri nukleaj centraloj kaj gravaj politikaj temoj. Estas varia enhavo, kun kortuŝa rakonto de eks-studentino, rakontoj pri liaj lastatempaj vojaĝoj en Japanio, Nepalo, kaj Mongolio, raporto pri liaj agadoj dum la UK en Portugalio kaj multe da alia interesa materialo.

Eble la **plej impona verko** estas *La Konflikto de la Epokoj* de Edwin de Kock, eldonita ĉe FEL, pliampleksigita vivoverko de la aŭtoro, kreita en sepjara laboro, kun longaj interrompoj, dum



preskaŭ 60 jaroj. “Ĉi tiu epopeo celas la veron, estante fikcio”, skribas de Kock.

#### Historiaĵo:

*For la bataliloj!* Temas pri kontraŭmilita romano de nobelpremiito Bertha von Suttner jam aperinta en 1914, kiu nun ĵus aperis en la serio Oriento-Okcidento.

#### Klasikaĵo:

*Baza literatura krestomatio*, jam la 4a eldono, korektita kaj kompletigita. Originalaj verkoj kronologie aranĝitaj, kun biografiaj notoj. Tekstoj de okdeko da aŭtoroj.

Redaktis

A. Korĵenkov. Bona enkonduko al la esperanta literaturo.



Claude Nourmont

Universitataj kursoj

# La Interlingvistikaj Studoj en Poznano



foto:  
Tatjana  
Stepanova

## Ĉu vi povus mallonge prezenti vin?

Mia nomo estas Tatjana Stepanova, mi loĝas en Sankt-Peterburgo, Rusio, kaj profesie mi estas instruistino de la angla, la franca kaj la itala. Do, mi interesiĝas pri lingvoj, kaj Esperanto iĝis unu el miaj plej ŝatataj, ĝis tia grado, ke mi decidis aliĝi al E-studado. Fakte pri tiuj ĉi studoj mi eksciis de mia amiko Ilia Gnusarev, kiu efektive rakontis pri la ebleco diplomiĝi pri Esperanto, kaj ni kune aliĝis al la studoj.

Oni parolas pri “la kursoj en Poznan”.

## Bonvolu precizigi en kelkaj linioj, pri kio temas.

Temas pri 3-jara ekstera postdiploma studado pri interlingvistiko sub la gvido de profesorino Ilona Koutny. Ĝi okazas en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM), Poznano, Pollando, ekde 1997, do ĝi funkcias jam 22 jarojn. Nia interlingvistika grupo estas jam la 7a, ni komencis la studojn en 2017 kaj finos en la jaro 2020, ankoraŭ restas por ni tri sesioj.

## Ĉu multaj homoj partoprenas la kursojn? Kiaj homoj?

Komence nia grupo enhavis 21 partoprenantojn el 12 landoj (Ĉinio, Koreio,

Turkio, Brazilo, Usono, Pollando, Francio, Svislando, Germanio, Hispanio, Rusio kaj Kazahio). Sed ĝis la kvara sesio ĉi-febuare restis 10 homoj en 8 landoj (Brazilo, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Koreio, Rusio, Usono). Ĉiaokaze eĉ la nuna grupo montriĝas vere multkultura! La homoj estas diversaĝaj, sed plejparte mezaĝuloj, kvin viroj kaj kvin virinoj, profesie malsamaj, tamen ĉiuj interesiĝantaj pri lingvoj, lingvistiko, Esperanto kaj instruado.

## Kial vi sekvas tiujn kursojn?

La ĉefaj kialoj por nia aliĝo estas pli profundiĝi en E-medion, subteni E-movadon, akiri valoran sperton, pli vastajn sciojn pri E-kulturo, E-historio kaj E-literaturo, kiujn eblos poste apliki en E-instruado kaj E-movado. Jes, estus vere interese ligi la vivon ankaŭ kun la instruado de Esperanto. Krome estas tiel interese sperti la studadon en multnacia grupo – valora sperto!

## Kion vi plej ŝatis?

Mi ŝatas multon! Mi ĝuas la agrablajn studentan etoson, mi ŝatas nian internacian amikecan grupon, niajn scivolemajn samgrupanojn, kiuj ofte eĉ eksterklase ne ĉesas pridiskuti diversajn

lingvistikajn temojn, mi estas dankema al niaj karaj kursgvidantoj, kiuj estas ĉiam helpemaj, zorgemaj kaj dividas siajn valorajn sciojn kun ni!

Ni jam havis kursojn kaj sukcese trapasis ekzamenojn pri fonologio kaj fonetiko (Nicolau Dols), interlingvistiko (Věra Barandovská-Frank), E-kulturo (Humphrey Tonkin kaj Aleksander Melnikov), E-morfologio kaj sintakso (Michael Farris), leksikologio kaj semantiko (Michael Farris kaj Nicolau Dols), E-gramatiko (Marc Bavant kaj Ilona Koutny), E-komunikado (Ilona Koutny), E-literaturo (Tomasz Chmielik, Lidia Ligęza, István Ertl). Kaj ĉi-septembre nin atendas ekzamenoj pri pragmatiko, aplikata lingvistiko, gvidataj de Ilona Koutny, kaj pri E-historio, pri kio jam prelegis al ni Aleksander Korĵenkov. La esplorado de la lingvo kaj E-movado estas diversflanka kaj abunda.

Dum multaj kursoj ni havas eblecon interveni, demandi, diskuti la enhavon de la prelegoj, esprimi niajn opiniojn, pridiskuti kune diversajn ambiguajn temojn.

Inter ĉiuj trapasitaj kursoj mi ŝatus aparte mencii tiun pri komunikado, ĉar laŭ mi ĝi estis aparte memorinda – ni parolis pri diversaj formoj de komunikado, kaj ekzemple eksciis multe pri amuzaj gestoj de diversaj landoj por esprimi emociojn kaj sentojn – estis ege gaja internacia etoso dum tiu kurso, kaj evidentiĝis, ke la sama gesto havas malsamajn signifojn en diversaj landoj kaj kulturoj!

Kaj ĝuste pro tio, ke mi tre interesiĝas pri literaturo ĝenerale, plej multe min impresis la kurso pri E-literaturo, kies diversaj periodoj estis brile kaj vere kortuŝe prezentitaj de niaj elokventaj profesoroj, kiuj mem multe kontribuas al la nuna disvolviĝo de E-literaturo, aŭ senĉese tradukante al Eo kaj eldonante imponan kvanton da libroj ĉiujare – ege

impresa laboro de Tomasz Chmielik kaj liaj helpantoj, aŭ mem verkante, kiel Lidia Ligęza kaj István Ertl. Dank' al ĉi kurso mi komprenis, ke E-literaturo estas vere bonkvalita kaj abunda, kio siavice pravas la vivecon kaj riĉecon de la lingvo!

## Ĉu dum la sesio, post la kursoj, vi trovas tempon por labori grupe, individue? Ĉu estas disponebla mediateko, dokumenta centro?

Dum la sesioj ni ofte kolektiĝas kaj kune pridiskutas malfacilajn momentojn antaŭ nia ekzameniĝo kaj post la kursoj ni jam aparte laboras hejme – rete estas speciale kreita grupo por la studoj ĉe edukado.net, kie ni devas plenumi testojn kaj fari taskojn kaj

skribi laboraĵojn, de tempo al tempo niaj profesoroj sendas al ni dokumentojn kaj materialojn por studi.

## Kion vi plej malŝatis?

Tio kion mi malŝatas rilatas al manko de mia memdisciplino. Malfacilas organizi tempon hejme por diligenta laboro, ja temas ĉefe pri koresponda kurso kun veturado al du sesioj jare. Kutime post la vica sesio mi revenas hejmen inspirita labori pri taskoj, sed iom post iom mi pli okupiĝas pri miaj ĉiutagaj devoj kaj lasas plejmulton por la lasta monato antaŭ la sesio.

## Ĉu vi havis iujn malfacilaĵojn, specialajn problemojn?

Malfacilaĵoj kutime koncernas veturadon, ne ĉiam estis facile por ni atingi

la lokon. Krome ne ĉiam estas facile solvi financajn problemojn, pro tio mi estas ege dankema al ESF (Esperantic Studies Foundation) kaj precipe al ĝiaj homoj pro ilia financa subteno kaj ebligado de stipendioj! Tiu fonduso nin, la studentojn, helpas multe!

## Kion vi rekomendus al estontaj studentoj?

Al estontaj studentoj mi rekomendus esti fervoraj pri la studado kaj memdisciplinaj por fari ĉiujn taskojn ĝustatempe, eble ankaŭ lerni iom da pola, ja scipovi la lokan lingvon povas esti tre utila por veturi tra la lando kaj simple ĝui la amikan studentan etoson, kiu kutime donas multe da energio kaj lasas neforgeseblajn impresojn!

## Bildrakontoj

# Tinĉjo: 90 jaroj da aventuroj!

**F**ine de januaro, eĉ ĉe gravaj televidkanaloj, kelkaj ĵurnalistoj fiere anoncis la 90an datrevenon de sia plej fama kolego: la ĉiam juna raportisto Tinĉjo. Ili profitis la okazon por rakonti kelkajn anekdotojn pri diversaj roluloj de la 24 albumoj de la Aventuroj de Tinĉjo, tradukitaj en pli ol 80 lingvojn. Kia bela eldona sukceso! Oni jam vendis preskaŭ 300 milionojn da albumoj tra la tuta mondo.

Fakte, la unua epizodo de la Aventuroj de Tinĉjo kaj Miluo aperis jaŭdon la 10an de januaro 1929 en *Le Petit Vingtième* (“La Eta Dudeka”), kiu estis ĉiusemajna suplemento por infanoj de la ĉiutaga katolika ĵurnalo *Le Vingtième Siècle* (“La Dudeka Jarcento”) en Bruselo. La juna Hergé, “ĉefredaktoro” de tiu suplemento, konjektis, ke tiuj publikigataj aventuroj aperos dum nur kelkaj semajnoj...

Kvankam komence tiuj aventuroj aperis nefajne desegnitaj kun infanecaj

gagoj kaj kliŝaj informoj, rapide venis la sukceso. Dank' al Ĉang Ĉong Jen, juna ĉina artisto renkontita por pli ĝuste rakonti pri Ĉinio en *La Blua Lotuso*, la stilo de Hergé multe progresis kaj scenare kaj desegne. Tiu stilo iĝos la skolo de “la Klara Linio” en la naŭa belarto, t.e. la arto de bildrakontoj.

En 2000 la fama revuo *GEO* baptis Tinĉjon “la vojaĝanto de la jarcento”, kaj en 2004 la franca gazeto *Le Figaro* eldonis kromrevuon, laŭdante lin kiel “la raportisto de la jarcento”.

En Esperantujo jam aperis 4 albumoj: *La Krabo kun Oraj Pinĉiloj* (1981, tradukis Hervé Gonin), *La Nigra Insulo* (1987, Jean-Pierre Danvy), *Tinĉjo en Tibeto* (2005, Hervé Gonin) kaj *La Templo de l' Suno* (2012, Hervé Gonin). Tre ofte aperas gazetartikoloj pri Esperanto kun fotoj de tiuj albumoj.

Tinĉjo povas esti tre bona reklamilo, informilo kaj eĉ pedagogilo por paroligi la progresantojn kaj praktikantojn (nepre legu kaj relegu la albumojn aŭ la



lernolibron *Bildstrioj kiel Lernolibroj*).

Dum la brita-franca kunkongreso de Esperanto en Dovro en aprilo 2019, kia plezuro paŝi laŭ la spuroj de Tinĉjo sur la blankaj klifoj de Dovro!

Ni tre facile rekonis la lokon desegnititan en *La Nigra Insulo*, kie du armitaj fiuloj-monfalsistoj postulis, ke Tinĉjo superu la rekordon de salto en profundon, por ke lia morto aperu kiel akcidento. Feliĉe Milu' helpe de kaprino savis lin...!

Michel Dechy



## Literaturo

# Premiitoj de la 70-a eldono de la Belartaj Konkursoj de UEA

**D**enove pluraj Francoj!  
La 25-an de julio, kadre de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio, okazis la premisdono de la 70-aj Belartaj Konkursoj de UEA. Sub gvidado de Miguel Fernández Martín kaj Miguel Gutiérrez Adúriz, respektive prezidanto kaj sekretario de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj, la ĉi-jara eldono rekordis pri la nombro de partoprenintaj literaturaj verkoj, kun entute 171 verkoj el la 5 kontinentoj: Oceanio, Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

La rezultoj estas jenaj:

### Branĉo Prozo

Partoprenis 31 verkoj de 22 aŭtoroj el 15 landoj (3 el Azio, 2 el Ameriko, 10 el Eŭropo).

**Tria premio:** en egaleco al la verkoj *Fanjo* de Ewa Grochowska el Francio, kaj *La plej granda tragedio* de Ariel Bonkorpa el Britio.

**Dua premio:** al la verko *Venko de tempo* de Christopher Lewis el Britio.

**Unua premio:** al la verko *La blua arbaro* de Jesper Lykke Jacobsen el Francio.

### Subbranĉo Mikronovelo

Partoprenis 49 verkoj de 30 aŭtoroj el 19 landoj (2 el Oceanio, 6 el Azio, 16 el Ameriko, 25 el Eŭropo).

**Unua premio,** premio Paula Adúriz: al la verko *Verŝajne* de Christian Rivière el Francio.

Jen la premiita verko: *Verŝajne*

Miaj gepatroj arigis en si ĉiujn homajn kvalitojn. Ili kvazaŭ simbioze kompletigis. Objektive, oni almenaŭ rekonu, ke la evidentan senzorgecon de mia patro kompensis la konata memfido kaj efektiva fidindo de mia patrino.

La someron antaŭ mia naskiĝjaro mia patro maltrafis la starton de alloga krozado, en kiu mia patrino estis pasaĝero. Kun sia valizo en mano kaj memproĉoj en la okuloj li korŝire konstatis, ke la ŝipo jam nereteneble foriras al la oceano.

Kiel konfirmis poste miaj du pliaĝaj gefratoj, se nia patro ne havus tiun fuŝan inklinon maltrafi jen ŝipon, jen nokto-trajnon, jen aviadilon, *ni verŝajne estus naskitaj.*



Christian Rivière

La juĝkomisiono trovas menciindaj jenajn verkojn:

*Ŝafoj* de Edmund Grimley el Britio, kaj *Teror-rakonto* de Paulo Sergio Viana el Brazilo.

### Branĉo Teatraĵo

Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

**Tria premio:** al la verko *Tutkorajn bondezirojn malŝlosajn* de Grupo de Esperantistoj de Francilio 2018-2019 el Francio.

La dua premio kaj la unua premio ne estas aljuĝitaj.

### Subbranĉo Monologo aŭ Skeĉo

Partoprenis 6 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

**Unua premio,** premio María Cuevas: al la verko *Maldikigi vortaregojn!* de Roman Dobrzyński el Pollando.

La juĝkomisiono trovas menciindaj jenajn verkojn:

*Konfeso de murdunto* de Asocio Espéranto-Grenoble el Francio, kaj *La tuta mondo estas teatro* de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

### Branĉo Eseo

Partoprenis 9 verkoj de 7 aŭtoroj el 7 landoj.

**Dua premio:** al la eseo *Stereotipaj komparoj en Esperanto* de Suso Moinhos el Hispanio.

**Unua premio,** premio Luigi Minnaja: al la eseo *Kodado en "La kato en la sako"*, de Mason Stuttard de Suso Moinhos el Hispanio.

### Infanlibro de la Jaro

Partoprenis 5 infanlibroj de 5 eldonejoj el 5 landoj.

La premio ne estas aljuĝita.

### Branĉo Poezio

Partoprenis 67 verkoj de 35 aŭtoroj el 22 landoj (12 el Azio, 1 el Afriko, 17 el Ameriko, 34 el Eŭropo).

**Honoraj mencioj:** al la poemoj *Knabo dum rifuĝado* de Yida Wei (Vejdo) el Ĉinio, kaj *Revoluciulo* de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

**Tria premio:** al la poemo *Tor fiŝkaptas* de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

**Dua premio:** al la poemo *Terra Incognita* de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

La unua premio ne estas aljuĝita.

UEA gratulas la premiitojn kaj ĉiujn partoprenintojn kaj kore dankas la Komisionon pri Belartaj Konkursoj kaj la juĝantojn pro la giganta laboro. Ĝis la 71-a eldono!

Mallonga ligilo al tiu ĉi komunikado:

[uea.org/gk/813a1](http://uea.org/gk/813a1)

Info: *Gazetara Komunikado de UEA* n-ro 813 (2019-07-25)



Jesper Lykke Jacobsen



Muziko

# Muzikaj Novaĵoj de Vinilkosmo

## Kjara: Blua Horizonto

*Blua horizonto* estas la unua albumo de Kjara (Chiara Raggi) en la panoramo de Esperanto-muziko kaj kulturo.

Temas pri dek kantoj, en kiuj Kjara miksas la kantaŭtoran stilon kun ĵazo kaj mondmuziko. Registrita inter Italio kaj Novjorko, ĉi tiu albumo profitas el la kunlaboro de internacie famaj muzikistoj, de malproksimaj muzikaj kaj geografiaj mondoj, de Brazilo ĝis Novjorko, tra la itala kantverkista tradicio.

*Blua horizonto* estas albumo verkita kun piedoj en la akvo, proksime al la maro, grava elemento en la Kjara-poetiko kune kun la temo de vojaĝado, serĉante belecon ene kaj ekstere de ni. Ĉi tiu albumo estas vojaĝo al homa ekzisto,



kaj rakontas travivaĵojn kaj sentojn kiuj loĝas en la koro de la homo.

Ĉiuj kantoj estis tradukitaj/adaptitaj de Renato Corsetti kaj Gianfranco Molle. La albumo estas dediĉita memore al Gianfranco Molle, pro lia pasio por Esperanto kaj pro la bonega laboro kiun li faris por la muziko.

etosplenaj kantoj. Ankie kaj Nanne akompanas sian kantadon per diversaj instrumentoj kiel gitaro, banĝo, citro, akordiono, kalabaso, koncertino, kontrabaso, sintezilo kaj ŝalmo.

“La Universala Arbo” estas la titolkanto de la nova albumo. Ĝian tekston originale verkis en la angla la aŭstralia aŭtoro Michael J. Roads, speciale por Nanne kaj Ankie, kaj Nanne komponis la melodion. Jam dum multaj jaroj la kanto estas inter la plej ŝatataj en ilia repertuaro. Antaŭ kelkaj jaroj la israela poeto Amir Naor proponis esperantigi la tekston, kaj li vere bone sukcesis fari tion. La teksto estas miraklo. Jam en la komenco de Kajto, la Kajtanoj serĉis tekstojn por siaj kantoj ankaŭ en poemaroj de poetoj el diversaj landoj. Ankaŭ nun, en la nova albumo, estas kelkaj tekstoj el poemaroj. Unu el tiuj estas “Vintra Fabelo”, malpeza amteksto de la rusa poeto Nikolai Hohlov. Nanne muzikigis la tekston, kaj jen... gajega kanto! Ankaŭ enestas “Hejmo”, kortuŝa poemo de Marjorie Boulton. Kaj multaj aliaj ravaj melodioj.

## Kajto: La Universala Arbo

**8-a albumo de Kajto, nova juvelo en la repertuaro de Kajto. Kajto prezentis la novan albumon dum koncerto kaj dum la omaĝo al Baldur Ragnarsson dum UK en Lahti.**



Jen bela okazo por kunkanti kun Kajto la novajn kantojn de tiu belega albumo.

En la albumo estas 14 novaj kantoj kun tekstoj en Esperanto. Kiel kutime pri la albumoj de Kajto, la varieco de la kantoj estas granda: melankoliajn kantojn sekvas gajaj, humuraj kantoj; rapidaj kantoj alternas kun malrapidaj,

## Tro – Ale kaj Vojaĝo – Argentino, Brazilo, Francio

Alejandro Cossavella, pli konata kiel Ale Kosabela, verkis la kantojn de la nova albumo *Tro*. Ili estis kantataj kun akompano de gitaro, apud kampfajro, ĝis kiam Jean-Claude Patalano kaj la bando Vojaĝo akceptis produkti ilin en Francio.

De tiu kunlaboro kun pli larĝa internacia artista partopreno (el Argentino, Brazilo, Francio, Svedio, Kazahio, Bosnio-Danio) naskiĝis tiu ĉi nova albumo.



La 10 originalaj kantoj de Ale el la 14 titoloj en ĉi tiu bita albumo estas verkitaj en la brazila kamparo, en regiono kie abundas akvofaloj kaj montoj, kaj, laŭ onidiroj, la eksterteranoj ŝatas parkumi siajn kosmoŝipojn. Krome menciindas, ke la verkado okazis en la esperanta bieno Bona Espero, kie ekde la jaro 1957 esperantistoj edukas kaj protektas infanojn kies familioj ne sukcesas ilin prizorgi.

La albumo *Tro* prezentas sonvojaĝon tra diversaj ritmoj kaj stiloj, kaj la vortoj kunportas nin de naturaj furzoj al kosmaj aventuroj.

Ĉiuj voĉoj estas registritaj en la sonstudio Artemisia en Alto Paraíso de Goiás, dum la florado de ipê-amarelo (blanka handroanto – *Handroanthus albus*).

Claude Nourmont

Pliaj informoj ĉe la blogo de Vinilkosmo  
<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo.html>

## Vojaĝo al Finnlando

**K**iel vojaĝi al Finnlando? Aviadile ne. Kial ne aŭtomobile kaj ŝipe? Mi ne ŝatas ŝipojn, sed... oni povas fari esceptojn.

Ni transiris Germanion, iom tro da ŝtopiĝoj, kutimaj ĉe aŭtoŝoseoj: tro da aŭtoŝoseaj pecoj, kie estas laboroj, kaj tiam estas nur du mallarĝaj trakoj, principe oni rajtas veturi nur je maksimume 90 (se ne 70 aŭ 50). Principe... neniu veturas tiom malrapide. Ni tranoktis en belega kaj trankvila loko en Dinklage. En arbaro.

### Tra Danio kaj Svedio

Sekvan tagon ni pluiras. Unua transiro ŝipa Puttgarden-Rødby, survoje al Lund (Svedio). Iom da atendo, sed ne tro. Danion ni rapide transiris. En Lund, agrabla hotelo, apuda parkumejo, apuda restoracio. Ĉarmaj malnovaj malgrandaj stratoj, kun pavimoj kaj dometoj. Impona katedralo. Ni manĝis en steka restoracio "M.e.a.t.", kie tamen eblis ricevi fiŝan manĝaĵon.

Kaj plu tra Svedio. Montetoj, golfoj, arbaroj. Fine ni atingas la havenon de Stokholmo. Kaj trovas la pramŝipon, kie ni rezervis lokon por la aŭto kaj kajuton por ni.

La vojaĝo ne estas ordinara. Ne la unuan fojon ni ĝin faras, sed ni ĉiam tre ĝuas ĝin. La ŝipo longe iras tra mirindaj fjordoj, vagas inter insuletoj, tute sovaĝaj aŭ kun dometoj, rokoj etaj kaj pli grandaj, foje tre proksime al la ŝipo.

Sed intertempe ni iris al la restoracio. Verŝajne tie mi ricevis la plej bongustan manĝaĵon de mia tuta vojaĝo. Mirinda bufedo! Vasta, kun abundo da elektoblecoj, por viandemuloj, vegetaranoj, fiŝemuloj, senglutenemuloj, ktp. Malvarmaj kaj varmaj pladoj. Ni mendis botelon de vino, je modera prezo ĉar surŝipe tiel estas kun malpli da imposto, sed konstatis poste, ke ni povintus simple servi nin el la vinkranoj, jam antaŭviditaj por la bufedo. Poste oni eĉ proponis senpage konjakon kaj similajn postmanĝajn drinkaĵojn.

Mi plene feliĉis kun la malvarma fiŝa fako de la bufedo. Haringoj en diversaj vestoj, salikokoj, fumaĵita salmo, skombro, fiŝaj ovoĵ... Kia regalo! Mi iom stumblis por trovi la panfakon (mi unue trovis la senglutenan... sed ne la ĝeneralan), sukcesis kolekti iom da desertoj... Konklude, eĉ sen konkoj, mi tre bone manĝis.

### Finfine Finnlando!

Ni dormis, kaj post nelonge, jam alvenis al Turku, frumatene. Ni eĉ devis forlasi la kajuton antaŭ ol la ŝipo estis ĉe kajo, ĉar taĉmento de purigistoj devas pretigi la kajuton, por la sekvaj vojaĝantoj, kiuj en Turku enŝipiĝos.

Des pli frue, ke estas horŝanĝo. En Finnlando estis nur la 6a matene. Unu horon pli frue ol en Svedio. Niaj poŝtelefonoj kaj komputiloj devis adaptiĝi. En tia horo en Turku promenas nur la homoj, kiuj ĵus elŝipiĝis kaj kelkaj hundoj, kiuj promenis siajn homojn.

Unue ni veturis al ĉarma loko Nantaali. Matenmanĝis tie, en rava loko ĉe marbordo: haveneto, freŝa vento, kuko, matena teo/kafo.

Poste havis plenan tempon ĝui la finnajn pejzaĝojn: arbaroj, lagoj, ĉarmaj vilaĝoj, lignaj dometoj... Sed antaŭurboj tro similas unu la aliajn, en kiu ajn lando de tiu ĉi parto de la mondo: la samaj konataj firmaoj, ĉu pri mebloj, ĉu pri agrikulturaj maŝinoj, ĉu pri aŭtomobiloj, ĉu pri burgeroj kaj similaj sengaŝtronomie rapidmanĝejoj.

Ni alvenis en Lahtio je la planita horo, trovis la centron kaj la straton kie ni rezervigis hotelon. Sed kie estas la hotelo? Nia mendo tekstis, ke ni havas rezervitan ĉambron en Solo Sokos. Sed fakte Sokos estas finna ĉeno, kiu rilatas ne nur al hoteloj, sed ekzemple al grandaj vendejoj. Ni unue trovis la tiel nomatan grandan vendejon. Ĉar ni havis la precizan adreson, ni fine komprenis, ke nia hotelo nomiĝas Lahden Seurahuone... Cetere agrabla hotelo, kun mirindaj matenmanĝaj bufedoj, por ĉies gustoj. Bedaŭrinde ke ni ĉiam devis rapidi al la kongresejo!



Interno de la koncertejo Sibelius "Sibeliuskonsertisalo", kie okazis la nacia vespero

### Lahtio, verda ĉefurbo

Larĝaj stratoj, arboj kaj parkoj, lagoj, Lahtio meritas sian nomumon kiel Verda Ĉefurbo de Eŭropo por 2021. Malmultaj malnovaj konstruaĵoj, ĉar la urbon, tiam ankoraŭ vilaĝo detruis incendio en 1877. La longa terkresto Salpausselkä trapasas la centron de la urbo. Lahtio estis fondita kiel urbo en 1905.

Post la sendependiĝo de Finnlando en 1917, komenciĝis la Interna Milito, dum kiu la Ruĝa Gvardio okupadis Lahtion dum tri monatoj. Germanaj trupoj konkeris la urbon en 1918, kaj la Blanka Gvardio starigis tie grandegan koncentrejon por 20 000 ruĝuloj kapitulacintaj. La ruĝuloj estis grandnombre ekzekutitaj. La urbo kreskis rapide, precipe post la Dua Mondmilito, kiam en Lahtio ekloĝis rifuĝintoj el la regionoj kiujn Finnlando devis cedi al Sovetunio. Vidu detalojn pri la historio ĉe <https://eo.wikipedia.org/wiki/Lahti>.

### Kongresa semajno

Dum la kongresa semajno miaj vizitoj de la urbo limiĝis al la ejoj, kie okazas kongresaj aranĝoj. La ĉefa kongresejo estis sportejo Isku Arena; ĝi certe taŭgas por grandaj sportaj eventoj, sed maltaŭgas por ne-sportemaj kongresanoj, kaj ĉefe por aranĝo de pli aŭ malpli intimaj kunsidoj. Tro da ŝtupoj de sporta dimensio! Zamenhof intimiĝis al Hodler, la vagado de unu salono al la alia estis foje aventura. Tamen kelkaj pozitivaj aferoj. La akustiko en salono Zamenhof estis bonega, malkiel en multaj kongresoj. Mi trovis kelkajn trukojn por eliri/eniri sen uzi ŝtupojn (estis facile por eliri, por eniri simple necesis aranĝi kun iu interne, ke oni malfermu al mi la pordon). Kaj fine, ni alktimigis: se la temo de la kunsido estas atentokapta, ni tute forgesas la materian kadron. Ni ne plu vidas, ke ni estas en loĝio, aŭ en noktoklubo...

Proksime de la kongresejo videblis la tri altegaj skisaltejoj, kiuj inspiris la kongresan emblemon.

### Lokaj kulturoj

La dimanĉa vespero estis kiel kutime la vespero, kiam oni prezentas specimenojn de la kulturo de la gastiganta lando. Tiel ni iris al la haveno ĉe la lago Vesijärvi, kie ni manĝis en memserva restoracio apud la koncertejo Sibeliusstalo. La koncertejo estas konstruita en 2000. La ĉefa salono estas plene el ligno, sed kovrita ekstere per vitro. Tre varia programo: orgenmuziko, repo en nordsamea lingvo, tradicia runokanto, cirko, kantel-artisto, nord-landa komunumorkestro... Eblis admiri la preskaŭan subsubiron post la spektaklo.

Ni ricevis inviton por akcepto en la urbodomo. La urbodomo de Lahtio, konstruita en 1912, estis konstruita laŭ novarta stilo. Impona konstruaĵo!

Ni aparte aprezis, ke granda atento estis donata al la lokaj kulturoj. Dum la inaŭguro okazis samea muzika paŭzo. Pluraj prelegoj rilatis al la lokaj lingvoj, kaj ni havis ankaŭ la bonŝancon, ke la organizantoj venigis sameajn fakulojn por prezenti siajn kulturojn kaj problemojn. Ĉi foje ni ne iris al Rovaniemi, kie la boacoj vagadas, sed estis en la programo tiu postkongresa ekskursebleco.

### Laŭ akvovojoj

Dum la merkredo ni partoprenis ekskurson al du subĉielaj akvovojoj – Vääksy kaj Kalkkinen.

Ni buse veturis al Vääksy, kie ni atendis ĉe la kluzo la ŝipon por krozi ĝis la vilaĝo Kalkkinen laŭ la kanaloj de Vääksy kaj Kalkkinen. Lunĉo surŝipe, sed iomege frue. Por nia grupo la restoracia parto estis rezervita nur ĝis la 11a... Bone, ke mi ŝatas matenmanĝi diversajn malvarmajn fiŝaĵojn, cetere tre bobgustaj. Kiam ni surteriĝis, ni paŝis al la bieno Viini- & Puutarhatila



Ŝipo de la ekskursita tago.  
Suomen Neito = Fraŭlino (belulino) de Finnlando



Retrorigarde al Vääksy sur Suomen Neito

Pihamaa, kie oni bonvenigis nin per gustumado de loke produktita fraga vino. Poste ni vizitis ĉarman preĝejon en Kalkkinen, kaj en Asikkala ni trarigardis la lokan muzeon pri fiŝkaptado. Reen al Vääksy sur la terkresto Pulkkilanharju, 8 km longa, meze de la lago Päijänne.

Al tiuj ĉarmaj lokoj ni reiris dimanĉe, rigardante aliajn preĝejojn, kaj ĝuante la belan naturon. Survoje al Helsinko, kie ni enŝipiĝis reen al Stokholmo, ni admiris la belegan urbon Porvoo, kie svarmis turistoj el ĉiuj landoj.


Varmiĝas la klimato, kaj en Finnlando ni atingis 32 gradojn. Sed verdis plu kampoj.

Nostalgie: unuan fojon mi venis al Finnlando en 1969, por la 54-a UK en Helsinki.

Claude Nourmont



**NOUVEAU !**



*L'espéranto,  
c'est dans  
la poche !*

- 24 pages en couleur
  - 8 mini-leçons illustrées
  - un lexique
  - des exercices corrigés
- pour s'initier rapidement à l'espéranto

en vente à la boutique d'Espéranto-France

feuilletez la brochure en ligne sur  
<https://esperanto-france.org/esperanto-dans-la-poche>